

# BULGARA

# ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



5 • 1980



Post la unua kunsido de la Konsultigo de E-organizaĵoj el socialismaj landoj: la delegitoj kaj la gastoj (vd. paĝojn 2—3)

## ENHAVO

|                                                                           |    |
|---------------------------------------------------------------------------|----|
| * * Cloron al la venko! Gloron al la paco! . . .                          | 1  |
| * * Komunikado pri la 13a Konsultigo . . .                                | 2  |
| * * Rezolucin pri solidareco . . .                                        | 2  |
| * * Deklaro . . .                                                         | 3  |
| D. Haĝiev. La X bulgara nacia packongreso . . .                           | 3  |
| Kr. Karucin. Plej granda! Unika! . . .                                    | 4  |
| * * Organiza vivo . . .                                                   | 5  |
| C. Kolarov. Kun la nomo de Bulgario . . .                                 | 6  |
| * * La premiitoj en la Nacia Revuo de la Esperanto-Parolo kaj Kanto . . . | 8  |
| Z. Elenova. Bulgara partino parolas . . .                                 | 9  |
| * * Изменения в устава на БЕС (проект) . . .                              | 10 |
| A. Gaev. Rememoroj de E-veterano . . .                                    | 12 |
| B. Golden. La sorto de volapuko en Bulgario . . .                         | 13 |
| G. Zjablova. Kiaj estas la rozoj en Monĵeron? . . .                       | 14 |
| A. Ionesov. Denove pripaca ekspozicio en Samarkando . . .                 | 15 |
| A. Müller. Rankontigo de E-veteranoj en GDR . . .                         | 16 |

|                                                                    |     |
|--------------------------------------------------------------------|-----|
| G. Karaslavov. Bubalo kaj skarabo . . .                            | III |
| * * Festo de la knaboj . . .                                       | III |
| * * Babela humuro. Anekdotoj. Anonco de Internacia E-Kursejo . . . | IV  |

### Sur la kovrilpaĝo:

*Bona leciono por novaj pretendantoj pri tutmonda hegemonio*

### Redakta komitato:

Kunĉo VĀLEV (ĉefredaktoro), Vasil BOROVSANSKI, Evĝeni GEORGIEV, Dimitro DENĈEV, Dimitro HAĜIEV, Krĉstju KARUCIN, Haim LEVI (viceĉefredaktoro), Flori NIKOLOV.

Administranto: Metodi Garev

Korektis: Rajna Konstantinova

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919.  
Eldonkvanto 6100. Indekso 20228.





## GLORON AL LA VENKO! GLORON AL LA PACO!

La 9 de majo! En tiu suna tago antaŭ 35 jaroj la artileriaj salvoj anoncis la kapitulacion de faŝisma Germanio — la ĉefa fundamento de la bruna infero kiu dum kelkaj jaroj estis starigita en granda parto de Eŭropo, ankaŭ en nia patrolando.

Ekestis tago de gojo, kaj jubilo.

Ekestis la longe atendita paco.

La ĉefa forto, kiu rompis la spinon de la ŝajne nevenkebla hitlerana armeo, estis Sovetunio, la sovetaj popolo kaj ĝia brava armeo. Pri tio estime parolis la prezidento mem de Usono Ruzvelt jam antaŭ la fino de la milito: „La rusa armeo kaj la rusa popolo en sia batalo kontraŭ la faŝista invado portis la ĉefan pezon de la batalo kaj manifestis nekompareblan heroismon. . .“

Pri la samo elokvente parolas la nerifuteblaj faktoj. Sur la Orienta Fronto la faŝismo perdis 507 germanajn kaj 100 satelitajn diviziojn, pli ol 75 000 aviadilojn, 160 000 kanonojn kaj minjetilojn. Tio estas malvenko nekonata en la tuta militohistorio de la homaro.

Dume la angla kaj usona armeoj disbatis nur 176 malamikajn diviziojn, plejparte en la fino de la milito.

Evidenta estas la decida rolo de Sovetunio por la frakaso de la faŝismo, kaj tute vanaj restas la klopodoj de la nuntempaj burĝaj ideologoj kaj historiistoj falsi la veron kaj sublaki la venkon de Sovetunio. Ĉiuj homoj kaj popoloj, kiuj batalis sindone kaj sinofere kontraŭ la faŝismo, estis helpantoj al la sovetaj popolo.

La venko estis gajnita per pri ol 50 milionoj da viktimoj, per grandegaj detruoj kaj teruraj suferoj de la popoloj. 20 milionoj de la pereintoj estis sovetaj civitanoj. En USSR la faŝistaj barbaroj detruis 1700 urbojn kaj pli ol 70 000 vilaĝojn, jetis en la aeron pli ol 32 000 uzinojn kaj entreprenojn. USSR perdis pli ol 32% de sia nacia riĉaĵo.

Defendante kaj liberigante sian socialisman patrujon, la Soveta Armeo liberigis ankaŭ dekon da landoj en Eŭropo kun ĉ. 113 milionoj da homoj. Sed ĝi liberigis ankaŭ la tutan mondon el la minaco de la bruna pesto.

La venko de Sovetunio estis venko de la plej humana ideo de nia nuntempo — la ko-

munismo. Ĝuste pro tio novan puŝon antaŭen ricevis la monda revolucia proceso. Formiĝis la monda socialisma sistemo, kiu fariĝis decida faktoro por la progreso de la homaro. Kreiĝis favoraj kondiĉoj por disfalo de la koloniisma sistemo. Dekoj da popoloj eliris sur la internacian scenejon, dekoj ekmarŝis laŭ la vojo al socialismo.

La decida rolo de Sovetunio por la frakaso de la faŝismo kaj la ŝtorma kresko de ĝia ĉiufanka potenco levis al nekonata ĝis nun alteco ĝian aŭtoritaton, multobligis la altiran forton de la socialismaj ideoj. Pri la vivokrea forto de tiuj ideoj elokvente parolas ankaŭ la ĉiufanka progreso kaj florado de la landoj el la frata socialisma komunado.

Sed la supreniro de la reala socialismo ne permesas trankvilon al la diverskoloraj reakciuloj kaj tiranoj en la mondo. La imperiismaj fortoj rapide forgesis la vundojn de la Dua Mondmilito kaj la instruon lecionon de la historio. Kiel sisteme la faŝismo ekbatalis por „nova sociordo“ en la mondo, tiel ankaŭ nun la usonaj imperiistoj revas pri „sia ordo“ en la tuta mondo kaj faras ĉion eblan por revenigi ĝin al la tempo de la „malvarma milito“, kaŭzas senĉese novajn konfliktojn kaj streĉecon en la internacia vivo. La pasintaj jaroj tamen montras, ke rezulte de la ŝanĝoj en la proporcio de la fortoj favore al la paco kaj socialismo la militoj jam povas esti evititaj, la agresfortoj de la imperiismo — usona kaj okcidenteŭropa — povas esti briditaj kaj haltigitaj. La spino de la fortoj, kiuj baras la vojon de la imperiisma militarismo, estas la monda socialisma komunado, unualoke ĝia potenco kerno Sovetunio, kaj la defenda organizo de la socialismo — la Varsovia Kontrakto. En sia 25-jara ekzisto tiu kontrakto transformiĝis en fidindan ŝildon de la nacia sendependeco kaj suvereneco de la socialismaj landoj, en potencon bastionon de la paco kaj sekureco en la tuta mondo.

La okazinta fine de aprilo renkontiĝo de reprezentantoj de eŭropaj komunistaj kaj laboristaj partioj estas nova grava manifestiĝo de la penoj de la internacia laborista movado daŭrigi la batalon por plua serenigo en la mondo, por malarmigo, por paco kaj interna-

cia amikeco. Tiu renkontigo de komunistoj el la malnova kontinento faris la konkludon, ke kontraŭ la agresulo oni devas kolektive batali, ke oni devas mobilizi ĉiujn fortojn de la paco kaj progreso por senmaskigi kaj sisteme fiksigi la aventurajn planojn de la imperiistoj.

Nia Popola Respubliko donas sian aktivan kontribuon por certigi pacon kaj sekurecon sur la Balkana Duoninsulo, en Eŭropo kaj en la tuta mondo. Ampleksigi la kunlaboron inter ĉiuj popoloj, disflorigi la internacian amikecon, konservi kaj plukonstrui la pacon sur

la tero — tio estas sincera deziro de la bulgara popolo kaj konstanta, principa politiko de la Bulgara Komunista Partio kaj nia popolo registaro. Tio estas ankaŭ profunda konvinko de la bulgaraj e-istoj.

Antaŭstaras ankoraŭ multaj obstakloj por la fortoj de la paco. Sed tiuj fortoj kreskas ĉiutage, ĉiuhore. La paco kaj la libereco, la feliĉo de la homaro kaj la severa leciono de la historio inspiras ilin al sincera kaj obstina laboro, al fidela kaj nobla batalo kontraŭ la milito.

## KOMUNIKAJO PRI LA 13-A KONSULTIGO

De la 18a ĝis 23a de aprilo 1980 en Sofio, Bulgario, okazis la 13a Konsultigo de Esperanto-organizaĵoj el socialismaj landoj. La Konsultigo, kiu pasis sub la signo de la 110-a datreveno de la naskiĝtago de V. I. Lenin, partoprenis reprezentantoj de jenaj organizaĵoj: Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko, Asocio de Sovetaj Esperantistoj, Bulgara Esperantista Asocio, Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, Ĝeŭa Esperanto-Asocio, Pola Esperanto-Asocio, Hungara Esperanto-Asocio kaj Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio.

La partoprenintaj delegitaroj traktis komun-intersajn problemojn de la internacia Esperanto-movado, interŝanĝis spertojn kaj informojn pri la kunlaboro inter siaj landaj organizaĵoj, aparte substrekante la rolon de Esperanto en la internacia pacbatalo. Oni plue akcentis la neceson de sistema edukado kaj kvalifikado de esperantistaj aktivuloj, la esploron de la sciencaj aspektoj de Esperanto kaj la aplikon de la Internacia Lingvo por scienco kaj tekniko. La delegitoj interkonsentis pri aktivecoj rilatantaj la celebradon de la 1300-jara jubileo de la Bulgara Stato en 1981.

### „NOVA STRATEGIO“

aŭ: „Kiom restas al la usona militaristo por ĵeti la planedon en la neekziston. . .“



La Konsultigo notis sian maltrankviliĝon pri la akriĝo de la internaciaj rilatoj. Oni esprimis sian esperon, ke la tutmonda esperantistaro ne allasos negativajn sekvojn de tiu akriĝo.

La partoprenintaj organizaĵoj emfazis sian pretecon ĉion fari por harmonia pluevoluigado de la internacia Esperanto-movado, substrekante, ke necesas reciproka respekto de la interesoj, vidpunktoj kaj enlandaj labormetodoj.

La Konsultigo akceptis rezolucion solidare al la popoloj kaj la esperantistoj de Vjetnamio, Laoso kaj Kampuĉio.

Al Bulgara Esperantista Asocio la partoprenintaj delegitoj esprimis sian dankon pro la bonegaj laborkondiĉoj, kiuj ebligis intensajn kaj rezultodonajn traktadojn.

Sofio, 23.04.1980

## REZOLUCIO PRI SOLIDARECO

Konsiderante la ekstreme streĉan situacion, kiu kreiĝis en Hindoĉinio kaŭze de la grandpotenca ekspansisma kaj hegemonisma politiko de Pekino, politiko konscie kuragigata de Vaŝingtono kaj de aliaj internaciaj reakciaj fortoj;

farante konsekvencajn konkludojn el la lasta agremilito, kondukita de la 17a de februaro ĝis la 16a de marto 1979, kaj decidante kontraŭstari al ĉiuj maljustaj perfortaj agoj kune kun ĉiuj porpacaj kaj progresemaj fortoj;

dezirante helpi al la popoloj de Vjetnama Socialisma Respubliko, Laoso kaj Kampuĉio defendi sian nacian sendependecon, konstrui socialismon kaj disvolvi E-movadon en paco kaj internacia kunlaboro;

ni, la partoprenantoj de la 13a Konsultigo de E-organizaĵoj de socialismaj landoj, okazanta en Sofio de la 19—23 de aprilo 1980, unuanime:

1. manifestas nian fratan subtenon al la popoloj de Vjetnama Socialisma Respubliko, Laoso kaj Kampuĉio kaj nian volon kontribui al la disvastigo de la internacia lingvo en tiuj ĉi landoj;
2. fondas solidarec-komisionon kun la popoloj kaj la esperantistaro de Vjetnama Socialisma Respubliko, Laoso, popoldemokratia Respubliko kaj Kampuĉia Popola Respubliko konsistantan el la jenaj personoj: D. Haĝiev (Bulgario), R. Hahlbohm (GDR), D. Perevalov (USSR), L. Kosieniak (Pollando), D. Kočvara (ĈSSR), Eva Farkaš (Hungario), A. Lukač (Slovakio);



3. alvokas ĉiujn E-organizaĵojn en la socialismaj landoj kaj en la tuta mondo, laŭ siaj eblecoj, liveri adekvatan helpon, kaj moralan kaj materialan, al la E-movadoj de Vjetnama Socialisma Respubliko, Laosa Popoldemokratia Respubliko kaj Kampučia Popola Respubliko.

Sofio, la 21an de aprilo 1980

## DEKLARO

La amasa kunveno, okazanta la 23an de aprilo 1980 en Sofio, en kiu partoprenas esperantistoj el Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Pollando, Sovetunio, Vjetnamio kaj Bulgario, kun granda maltrankvilo konstatas la plifortigon de la politika streĉo en la mondo. La imperiistaj fortoj kaj precipe Usono kaj NATO iniciatis la reokazigon de malvarma milito, kiu alprenis neatingitan antaŭe amplekson. Usono uzas bojkotojn kaj aliajn formojn de ĉantaĝoj.

La Blanka Domo malkaŝe prenis kurson de plifortigo de la vetarmado, kies celo estas renversi la ekzistantan ekvilibron de militfortoj, por povi rilati al Sovetunio kaj al la aliaj socialismaj landoj el pozicio de forto. La usona registaro malkaŝe deklaris la intencon interveni en internajn aferojn de evoluantaj landoj, kiuj ne deziras plu toleri la novkoloniisman ekspluatadon. Usono bremsas la justan solvon de la konflikto en Proksima Oriento, estigas novajn militbazojn en la regiono de la Persa Golfo kaj minacas Iranon per militoperacioj.

Ni kategorie kondamnas tiujn danĝerajn por la homaro agojn. Ni — fidelaj al la principoj de la paca kunekzisto, difinitaj unue de Lenin, kies 110an naskiĝdatrevenon solenas nun la tuta progresema mondo — apelacias al la tutmonda esperantistaro firme batali kontraŭ la aspiroj de la imperiistoj eksplodigi novan mondmiliton; ni apelacias por la plifirmigo de la paco sur la tero.

La paco estas la plej supera bono, kiun la homoj deziras en sia vivo.

*Servantes*

Ĉiu staranta ĉe ŝtata posteno devas eviti la militon, kiel kiel la kapitano evitas la ŝiprompiĝon.

*Mopasan*

## LA X BULGARA NACIA PACKONGRESO

La 13an kaj 14an de marto 1980 en Sofio okazis la X nacia kongreso de la pacdefenda movado en Bulgario. Ĝi kunvenis antaŭ la plej granda kaj plej grava forumo, kien iam organizis la Monda Packonsilio dum sia tuta ekzistado — la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco (en la proksima septembro en Sofio).

La kongreso havis grandan signifon ankaŭ por la sukcesa preparo de tiu ĉi forumo. Ĝin partoprenis pli ol 950 delegitoj, reprezentantoj de ĉiuj generacioj kaj ĉiuj sociaj tavoloj. Inter la delegitoj estis ankaŭ e-istoj: Nikola Aleksiev — la honora prezidanto de MEM, Hristo Gorov — prezidanto de la Bulgara Esperantista Asocio, doc. Georgi Dimov el Varna k. a. Partoprenis ankaŭ delegitaro de la Monda Packonsilio ĉekape kun ĝia prezidanto s-ro Romeŝ Candra kaj delegitaro de la pacdefendaj movadoj en Cipro, Ĉeĥoslovakio, GDR, Grekio, Hungario, Kubo, Laoso, Mongolio, Pollando, Rumanio, Turkio, USSR, Vjetnamio.

La packongreso bilancis la agadon de la milionoj da pacamikoj en Bulgario de post la packongreso en 1973 kaj revuis la sukcesojn de la monda pacdefenda movado dum tiu periodo, inter kiuj aparte reliefigas la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaborado en Eŭropo en 1975, la speciala sesio de la Ĝenerala Asembleo de UNO pri la problemoj de la malmarmado, la subskribo de la Kontrakto SALT-2. Lige kun tiuj iniciatoj la packomitatoj en nia lando disvolvis vastan agadon, obligante al la publiko esprimi sian apogon al ili. La packomitatoj organizis amasajn protestkampanjojn kontraŭ la neŭtrona bombo, la prokrasto de la ratifiko de Kontrakto SALT-2, la kurso de senĉesa plialtigo de la militbuĝetoj de Usono kaj de NATO-landoj, la decido pri instalo de novaj nukleaj raketoj „Purshing“ (Päršing) kaj „Cruise“ en iuj okcidentaj landoj, la subskribo de nova agreskontrakto inter Egiptio kaj Israelio, la plifortigo de la milita ĉeesto de Usono en Persa Golfo kaj Hinda Oceano. Sian aktivadon la pacmovado efektivas en intima kunlaborado kun la Patrolanda Fronto, Bulgara Agrarista Popola Unuiĝo, la Bulgara Sindikatoj, Dimitrova Komunista Junulara Unuiĝo, Komitato de la Movado de Bulgara Virinoj, Tutnacia Komitato de Bulgara-Soveta Amikeco, Nacia Komitato de Sekureco kaj Kunlaborado en Eŭropo kaj aliaj organizaĵoj kaj movadoj.

En la diskutoj partoprenis pacaktivuloj, laborantaj en diversaj sektoroj de la socia kultura vivo, gvidaj figuroj de la supremenciitaj organizaĵoj. Parolis ankaŭ la ĉefo de Bulgara Ortodoksa Eklezio Maksim—patriarko bulgara, kaj la ĉefmuftio Mehmed Topĉiev en la nomo de la mahometanoj en PR Bul-

La amasa kunveno de la „sofiaj“ e-istoj je la 23. IV. 1980. En la unua vico sidas la delegitoj el la Konsultigo.



gario. En sia salutparolado la prezidanto de la Monda Packonsilio s-ro R. Candra diris, ke la bulgara pacmovado estas unu el la avangardaj taĉmentoj de la monda pacmovado. Li substrekis, ke lastatempe en la mondo kreiĝis maltrankviliga internacia situacio rezulte de la agoj de la reaktiaj rondoj en Usono kaj Okcidenta Eŭropo kaj de la ĉina gvidantaro, kiuj volas reŝanĝi la radon de la historiaj kaj starigi la homaron antaŭ la minaco de nova mondmilito. S-ro Candra refutis la senbazajn argumentojn de la monda reaktiularo pri la „soveta minaco“. „Sovetunio; — konkludis li, — efektive prezentas minacon, tamen minaco por la manpleno da militemuloj; por tiuj, kiuj profitas miliardojn el la produktado kaj vendado de pereigaj armiloj.“ Plue s-ro Candra parolis pri la celoj kaj la taskoj de la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco, adresante alvokon al ĉiuj honestaj kaj progresemaj homoj sendi delegitojn al Sofio por ellabori kolektivajn planojn pri batalo kontraŭ la atenco al la paca estonteco de la planado.

La delegitoj de la kongreso akceptis unuanime deklaron, en kiu ili esprimis sian seriozan maltrankvilon pro la malfavoraj ŝanĝoj en la internaciaj rilatoj, estiginta rezulte de la malkaŝaj agresaj agoj de la imperiismaj fortoj.

En la deklaro la kongresanoj decide kondamnis la provojn ĉesigi la proceson de profundigo de la malstreĉeco ankaŭ en la milita sfero kun la nura celo retroirigi la mondon al la epoko de la „malvarma milito“ kaj al la pozicio de diktado. Samtempe la kongresanoj esprimis sian kredon kaj optimismon je la estonteco. Ili substrekis, ke la pacamo estas fundamenta karakteriza trajto de nia socialisma lando, kiu devenas el la naturo mem de la socialisma sociordo, el la humanismo de nia revolucia ideologio — la marksismo-leninismo.

La kongreso esprimis sian firman subtenon al la pacama kaj realisma ekstera politiko de Sovetunio, al ĝia konstruiva kurso, direktita al konservo de la politika malstreĉeco, al ties vastigo ankaŭ en la militan sferon kaj deklaris, ke ĝi konsideras kiel unu el siaj plej gravaj taskoj aktive senmaskigi la malican antikomunistan kaj antisovetisman kampanjon, iniciatitan de la imperiisma propagando.

Estis anoncote, ke la Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario distingas la Bulgaran Nacian Pacdefendan Komitaton per la plej alta ordeno — „Georgi Dimitrov“.

La kongreso elektis novan nacian pacdefendan komitaton. En ĝi estis reelektita Nikola Aleksiev. Estis elektitaj ankaŭ delegitoj por la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco.

La Xa nacia packongreso denove manifestis la strebon de la bulgara popolo batali konsekvence kaj sendevie por triumfo de la paco, malmarmado, kunlaborado kaj interkomprenigo inter la popoloj. Esprimo de tiu ĉi strebo estis ankaŭ la multnombraj saluttelegramoj, senditaj al la kongreso fare de la politikaj kaj amasaj organizaĵoj de laborkolektivoj kaj kreaĵoj uniigoj, de lernejoj k.a., deklariantaj sian pretecon helpi aktive por preparo de Monda Parlamento de la Popoloj por Paco.

La bulgaraj e-istoj, kiel aktivaj pacbatalantoj, aprobas arde la decidojn kaj la dokumentojn de la kongreso kaj deklaras sian pretecon labori por ties efektivigo, por la triumfo de la paco, utiligante la internacian lingvon E-o.

**Dimitro HAĜIEV**

prezidanto de la bulgara MEM-komitato

La kapitalismo portas en si la militon kiel la nubo portas la ŝtormon.

**J. Jores**

La vera paco postulas antaŭ ĉio forigon de la mastroj de l'milito.

**R. Roland**



## PLEJ GRANDA! UNIKA!

**Evento ĝojiga, evento esperplena: ĝis la 14a de aprilo al la 40a Jubilea Kongreso de BEA aliĝis 1732 kongresanoj kaj aliĝoj daŭre alfluas! Per tio nia jubileo jam fariĝis la plej granda bulgara esperantista kongreso kaj la plej granda nacia E-kongreso en la tuta mondo. Ĝi ankaŭ superis 41 Universalajn Kongresojn de E-o! La multnombra aliĝo pruvas ankoraŭfoje, ke la E-movado profunde kaj firme enradikiĝis en nia lando, ke E-on akceptas ĉiuj tavoloj de la bulgara popolo.**

Sed tiu evento ne nur ĝojigas, ĝi ankaŭ forte devigas nin — ĉiujn bulgarajn e-istojn, aparte la kongresanojn. Pro tio ni devas streĉi la fortojn por plej brila, plej fruktodona pasigo de la kongreso. La tempon ĝis la kongresdato ni uzu por plua perfektigado de niaj lingvokonoj, de nia parolkapablo en E-o. Dum la kongresaj tagoj oni aŭdu ne nur en la kongresejo, sed ankaŭ en diversaj publikaj lokoj fluan, belsonan E-parolon.

Dum la kongreso ni ĉiuj kontribuu por la glata iro de la kongresaj aranĝoj ekde la akcepto ĝis la adiaŭo. Estas necesa plej altkonscia disciplino, volo por servi al la aliaj. En la diversaj aranĝoj ĉiu donu sian, eĉ tute modestan kontribuon. La asocian agadon dum la raportata periodo kaj la iniciatojn por la estonto pridiskutos la delegitoj, elektitaj en la distriktaĵ konferencoj. Sed estas ankaŭ aliaj forumoj, en kiuj ĉiu kongresano nepre devas partopreni. Tio estas la kunvenoj de la asociaj sekcioj laŭ profesioj aŭ interesoj, pli ol 20. La kunsidoj de la sekcioj okazos, escepte de la Junulara, samtempe — la 14an de julio posttagmeze. Eĉ ne unu kongresano restu flanke de iu ajn el tiuj kunvenoj! Ni profunde pridiskutu nian fakan agadon, elfosu la sekvindajn spertojn, malkovru la mankojn, emfazu la celojn estontajn.

Mi ŝatus atentigi ankaŭ pri la jeno. En la kongresa librostando de la Bulgara Esperantista Kooperativo estos proponata la ĵus aperinta nova libro „La apostolo“ de la angla verkistino Mersia Makdermot — pri la vivo de la bulgara naciliberiga heroo Vasil Levski. Kia frandaĵo por nia esperantistaro! Ĝin ĉiu kongresano nepre devas aĉeti, eĉ po pluraj ekzempleroj, por donaci al siaj fremdlandaj korespondantoj.

Nin atingis ankaŭ alia agrabla novaĵo: la librostando proponas ankaŭ la libron „Elektitaj verkoj“ de nia eminenta esperantista poeto Asen Grigorov. Ankaŭ ĝin neniu poeziŝatanto devas preterlasi. Kompreneble, BEK prizorgos,



## LA ESPERANTISTOJ CELEBRAS LENIN

Vaste tra la lando, kune kun la tuta popolo, la bulgaraj e-istoj celebris solene la 110an naskiĝdaton de la granda Lenin.

La solena celebrazo far la sofiaj e-istoj okazis la 16an de aprilo. Bonegan paroladon pri la vivo, batalo kaj ideoj de Vladimir Iljiĉ faris kado Violin Oljanov — ĉefredaktoro de revuo „Paco“. En la belarta programo partoprenis G. Dilova, Marieta Penkova, Kunĉo Vălev, Dimitro Denĉev. Oni aŭdigis la voĉon de Lenin kaj ŝatatajn kantojn de Lenin. Estis projekciitaj bildoj de famaj pentristoj pri Lenin kun E-klarigoj de Anani Anev.

## VERDA STELO EN BOTEVGRAD

La 22an de marto surbaze de E-kurso, kiun gvidis Vanko Bărdarov, en u. Botevgrad estis fondita E-societo. Dekkvin gekursanoj kolektiĝis en la turista domo „Kojna i Nikola Mokanski“ apud la urbo. La domo staras je 100 m de la loko, kie en 1944 pereis geedzoj Kojna kaj Nikola Mokanski, popolaj partizanoj. La entuziasmo de la junaj e-istoj, kiuj per E-o deziras labori kaj batali por popola kaj tut-homara feliĉo kaj tutmonda paco, kunlandiĝis kun la grandaj ideoj de la fidelaj popolaj gefiloj, kiuj donis sian plej karan — la vivon — por la libero kaj feliĉo de la popolo.

Karaj gastoj de la fonda kunveno estis deko da e-istoj el Sofio, inter kiuj k-ĉefo Kunĉo Vălev, sekretario de BEA, Dimitro Haĝiev — prezidanto de la Nacia Komitato de MEM, Dimitro Vukovski — el la estraro de la Studenta E-Societo „Vela Peeva“, kiuj sincere salutis la novajn verdstelojn.

Unuanime kiel patrono de la nova E-societo estis akceptita Trifon Hristovski — elstara bulgara e-isto kaj antifaŝisto el la batalema regiono de Botevgrad. Estis elektita 6-membra estraro kun prezidanto Mitrofan Vălev — ĉefredaktoro de j. „Botevgradski Plamak“.

La entuziasmaj junaj e-istoj prezentis interesan belartan programon, kiu komenciĝis per originala himno de la nova societo. En ĉiuj regis alta spirito kaj vigla preteko labori por kaj per E-o.

## FONDITA NOVA SOCIETO

Multaj sanprotektaj laboristoj en u. Loveĉ jam lernas la internacian lingvon E-o. Honore al la antaŭstaranta 40a jubilea kongreso de BEA la 13an de februaro ili fondis sian societon. Ĝi ricevis la nomon de la kreinto de E-o d-ro L. L. Zamenhof. En la nova societo membras kuracistoj, kuracisthelpanoj, flegistinoj, apotekistoj. Ili havas grandan deziron per E-o kontakti kun siaj kolegoj el la tuta mondo, konatigi ilin kun la atingoj de nia socialisma patrolando kaj ĝiaj naturbelaj kaj samtempe interŝanĝi spertojn.

Kiril Kalĉev

ke en la librostando estu abundaj titoloj de aliaj E-libroj kaj diversaj suveniroj. Ankaŭ la nova gramofondisko denia famekonata artisto-esperantisto Veselin Damjanov estos vendata. La disvendo de granda kvanto de E-libroj kaj esperantaĵoj estos unu el la kriterioj pri la sukceso de nia 40a.

Kr. KARUCIN  
sekretario de BEA

## 80 JAROJN ORGANIZITA E-MOVADO EN RUSE

La jam tradicia Printempa Amika E-Renkontigo (PARE) ĉi-jare koincidis kun alia grava evento en la vivo de la e-istoj de Ruse — la 80-jariĝo de la organizita E-movado en la urbo. Tiu duobla kazo efikis tre bone, kaj en Ruse kolektiĝis ĉ. 300 e-istoj el ĉiuj anguloj de nia patrolando kaj 2 el la gemela urbo Potsdam (GDR).

La solena kunveno okazis la 5an de aprilo en la Junulara Kulturdomo, en kies vestiblo estis arangita bildkarta kaj filatela ekspozicio. Oficialaj gastoj el la urbo estis: Genĉo Kolarov — prezidanto de la DK de Patrolanda Fronto, Rajnov el DK de BKP, Donka Kovaĉeva — de la Komitato de Kulturo.

La solena komenciĝis per la E-himno „La Espero“. Raporton pri la jubileo faris Georgi Dobrev — prezidanto de E-societo „Liberoj“. Oficialan saluton en la nomo de la gvidaj organoj de Ruse prezentis k-ĉefo G. Kolarov. En la nomo de BEA salutojn prezentis Kr. Karucin, sekretario. Li ornami la brustojn de multaj veteranoj kaj aktivuloj de la E-movado en Ruse per oraj, argentaj kaj bronzaĵoj jubileaj insignoj de BEA.

En la riĉa belarta programo partoprenis la veterano de la E-movado Boris Kavalĝiev per propra versaĵo, geartistoj el la opero de Ruse, lerneja folkloro ensemblo. La teatra trupo de E-societo „Libero“ prezentis la komedieton „La gastino“ de S. Sly. Sekvis komuna vespermanĝo, amika kunesto, dancoj, amuzado. La 6an de aprilo la gastoj trarigardis la urbon kaj vizitis la muzeon de la nacia heroino Avino Tonka.

Boris Kavalĝiev

## PRINTEMA AMUZVESPERO

La 19 an aprilo en Sofio okazis granda printempa esperantista amuzvespero. Partoprenis ĉ. 300 personoj. Karaj gastoj estis la eksterlandaj delegitaroj, venintaj per la ĉiujara Konsultigo.

La unua parto de la vespero apartenis al arta aktiveco. Estis prezentita riĉa kultura programo el individuaj kaj kolektivaj kantoj, recitado, humuraĵoj kaj. Partoprenis ĝin nur e-istoj: per recito G. Dilova, J. Zdraveva, M. Văleva, V. Vajarova, la infanoj Iveta Cvetkova kaj Kr. Dilova. Kantis: D. Denĉev, Pr. Prodanov, St. Kalimenova, M. Elenova, M. Zdravev. Muntajon el poeziaĵoj kaj kantoj prezentis la infana ensemblo „Verdaj steloj“.

La dua parto de la vespero konsistis el dancoj, gajaj konkursoj, ĵonglaĵoj.

La fondintoj de la E-societo en Botevgrad kaj iliaj gastoj l Sofio antaŭ la monumento de Kojna kaj Nikola Mokanski.



## FESTO DE LA E-KANTO EN SOFIO



La ĥoro de la sofiaj e-istoj

### DEFENDE AL LA PACO

En Ruse, laŭ iniciato de la DE de BEA, de E-societo „Libero” kaj la Komisiono de MEM, en publika kunveno parolis k-ĉo Nikola Aleksiev—Heroo de la socialisma laboro, honora prezidanto de MEM kaj membro de la Monda Pakkonsilio. Lia temo estis: „La batalo por paco kaj senarmigo—necesaj problemoj de nia nuntempo”.

### SENPAĜA EKSURSO

La 10an de aprilo e-istoj de Gabrovo faris agrablajn „senpagan” ekskursojn al Soveta Latvio.

K-dino Sonja Tiĥova tre interese rakontis pri sia vizito en Rigo kaj aliaj lokoj en tiu lando kaj pri la ĝoja renkontiĝo, kiun ŝi havis kun siaj korespondamiko Nata kaj Talis Bercis el Rigo kaj Tatjana Kurepina el Rostov—Don.

Per diapozitivaj Tiĥova montris interesajn vidindaĵojn el antikva Rigo. La tuta klariga teksto dum la projekciado estis en E-o.

Milka Janeva

## Juna esperantisto

## KUN LA NOMO DE BULGARIO

### NACIA JUNULARA REVUO DE LA E-PAROLO KAJ KANTO EN LOVEĈ

Je la 1—3 de aprilo Loveĉ, la urbo de la siringo, denove estis ĉefurbo de grava nacia E-arango — la Nacia Junulara Revuo de la E-Parolo kaj Kanto. Loveĉanoj povas esti fieraj, ke dum la lastaj jaroj ili estis dommastroj de kelkaj similaj arangoj: en 1966 j. — la VII Festivalo de la Bulgara E-Junularo, en 1967 j. — la II Internacia E-laborbrigado, kiu helpis la konstruadon de la panorama vojo ĉirkaŭanta la urbon, en novembro 1979 j. — konferenco de la E-Junularo el Nordokcidenta Bulgario. Do, oni povas diri, ke la spirito de gastamo kaj laborpreteco, tiel bone manifestitaĵ dum la 27a kongreso de la bulgaraj e-istoj, okazinta en 1940 j. en Loveĉ, vige vivas en la koroj de loveĉanoj kaj entuziasmigis ilin. Sed la pinton en tiu vico da

eventoj okupis la Nacia Revuo, dediĉita al la 1300a jariĝo de Bulgario kaj la 110a datreveno ekde la naskiĝo de la granda Lenin. Oni povas diri, ke Loveĉ estis tre trafe elektita por tiu arango. En la bulgara historio ĝi okupas propran lokon. Ĝi estas heredanto de la traca kaj poste romia urbo Melita. Oni supozas, ke ĝia nomo devenas de la malnova bulgara vorto „lovac” — loko por ĉasado. En la malnovaj paĝoj de la bulgara ŝtato Loveĉ estas fiksitaj kiel loko, kie oni subskribis la pacan kontrakton inter fratoj Asen kaj Petro kaj Bizanco, laŭ kiu tiu lasta agnoskis la liberigon de Bulgario, do komenciĝis la Dua Bulgara Ŝtato.

Loveĉ estis centro de la interna revolucia organizo sub la gvido de la senmorta Vasil Levski.

Ciuj ĉi antaŭkondiĉoj supozigis bonan pasigon dum la tri festivalaj tagoj en la urbo de la unua bulgara kosmonaŭto Georgi Ivanov. La programo komenciĝis per gaja interkona vespero la 1an de aprilo en la Distrikta Junulara Domo. Dancado, kvizo, tombolo, multaj ŝercaj ludoj kaj agrabla kunesto plenigis tiun vesperan programon, kiu daŭris ĝis noktomezo.

La saman atmosferon oni guis ankaŭ la sekvan vesperon dum la printempa junulara balo en la sama domo. La balo komenciĝis per literatura kaj muzika programo prezentita de artkolektivoj de la loka sindikata kulturdomo.

La 2an de aprilo la suno gaje ekrigardis el super la rokoj de „Strateŝ”. Estis frue por laodoro de la ankoraŭ dormantaj siringoj, sed la E-atmosfero anstataŭis ĝin

Kovo

en tiu ĉi mateno. En la salono de la distrikta teatro estis venintaj pli ol 600 homoj, plejparte junularo, por partopreni la solenan inaŭguron de la Revuo. Inter la honoraj gastoj okupis lokojn k.d. Ivanka Kjurdova — sekretariino de la Distrikta Komitato de Bulgara Komunista Partio en Loveĉ, Evgeni Uzunov — unua sekretario de DK de Komsomolo kaj honora prezidanto de la Organiza Komitato de la Revuo, Nikolaj Daskalov — gvidanto de la ideologia fako de Distrikta Konsilantaro de Sindikatoj, k. a. Malferman paroladon faris k.d. Evgeni Uzunov. Li substrekiis, ke en Loveĉ kaj ĝia distrikto dum la faŝisma periodo ekzistis forta revolucia movado, kiun la e-istoj aktive partoprenis. Kelkaj el ili donis sian vivon en la batalo por popola libero kaj socia justeco: la famaj partizangvidantoj Hristo Kărpaĉev kaj Stojan Edrev, la gepartizanoj Doĉko Săev kaj Totka Săeva k.a.

La ĉeestantojn salutis ankaŭ la prezidanto de Bulgara E-Junularo kaj sekretario de BEA Dimitro Papazov.

La junpionirino Veronika Kaparaseva tralegis projekton de telegramo al CK de BKP, kiu estis tondre aplaudita kaj unuanime akceptita.

Post la inaŭguro la impona amaso de revuanoj direktigis al la monumento de la partizankomandanto e-isto Hristo Kărpaĉev, kie oni metis florkronon.

Komenciĝis la revuo mem en du salonoj: unua grupo — 7-14-jaraĝaj kaj dua grupo — 14-35-jaraĝaj. Tutan tagon sur la du scenejoj la junularo de Bulgario kantis kaj recitis en E-o, manifestis siajn talentojn, noble konkuris inter si.

La 3an antaŭtagmeze okazis la solena fermo. La partoprenintoj en la revua programo estis salutitaj de la juriaj prezidantoj, kiuj anoncis la nomojn de la premiitoj. La prezidanto de BEJ D. Papazov enmanigis al ili honorajn diplomojn kaj memordonacojn.


Sekvis kolektiva ekskurso al la rimarkindaĵoj de la urbo — la arkitektura-historia rezervejo Varoŝa, la monumento de la liberec-apostolo Vasil Levski ka' la domo de la unua bulgara kosmonaŭto Georgi Ivanov, kie oni renkontiĝis kun liaj gepatroj. Poste per aŭtobusoj la revuanoj vizitis la tragikan „Kăkrinsko Ŝanĉo“ (Gastejo de Kăkrina), kie en decembro 1872 Levski estis kaptita de la turkoj.

La Revuo de la Esperanto-Parolo kaj Kanto en Loveĉ enskribis novan paĝon en la vivo de la supreniranta bulgara E-movado, de la movado por kompreniĝo kaj amikeco inter la popoloj, por pura ĉielo super nia planedo.

CoCo KOLAROV



La infanoj el Sofio: I premio



La infanoj el Madan: I premio

La solena anoncado de la premiitoj. De maldekstre: D. Papazov, C. Kolarov, V. Oljanov, K. Vălev (parolanta), M. Elenova.





# LA PREMIITOJ

EN LA NACIA REVUO DE LA ESPERANTO-PAROLO KAJ KANTO

## INDIVIDUAJ

### 1—4 klasoj

#### Recitado

- I — Iveta Cvetkova — Sofio  
II — Vladislava Atanasova — Pleven  
III — Evelina Mineva — Sofio  
Iskra Oljanova — Sofio  
Krasimira Dilova — Sofio  
Kuračiga — Ivelina Angelova — Sofio

#### Kantoj

- III — Natalija Georgieva — Loveč

### 5—8 klasoj

#### Recitado

- I — Kapka Dečkova — Orjaĥovo  
II — Tanja Bosakova — Velingrad  
III — Toni Stoičkova — Čepelare  
Sirna Loševa — Čepinci, Smoljan-distr.  
Veronika Krásteva — Loveč  
Mariela Petrova — Loveč

#### Kantoj

- I — Penka Vasileva — Sofio

### 9—11 klasoj

#### Recitado

- I — Marieta Ivanova — Sofio  
II — Valja Ahčieva — Sevljevo  
III — Galina Stojanova — Kubrat  
Maja Pateva — Sofio  
Mariana Petrova — Čepelare  
Antoaneta Kirilova } V. Tárnov  
Mariana Dobrea }

### 18—35-jaraj

#### Recitado

- I — Várbinka Ignatova — Botevgrad  
II — Steljana Kavrákova — Trojan

- III — Magdalina Georgieva — Pazarĝik  
III — Petja Karaivanova — Gálábovo  
Nadejda Petrova — Loveč  
Pavel Pajmakov — Trojan

#### Kantoj

- I — Mitoška Stojanova — Jambol  
II — Dimitrinka Dimitrova — v. Borima  
II dueto: Keranka Sotirova kaj Párvoleta  
Popova — Sofio

## SPECIALAJ PREMIOJ:

- Maja Bizova } Velingrad  
Tanja Enčeva }  
Vera Cokova }

## KOLEKTIVAJ

### 1—4 klasoj

- I — E-grupo en 66a baza lernejo, Sofio  
II — E-grupo el Pleven

### 5—8 klasoj

- I — E-grupo — Madan  
II — E-grupo en 1 baza lernejo — Velingrad

### 9—11 klasoj

#### Recitado

- II — E-grupo el Svištov

#### Kantoj

- I — E-grupo el Kubrat  
II — E-grupo el Svištov  
III — E-grupo el Sevljevo

### 18—35-jaraj

#### Recitado

- I — E-grupo — Jambol  
II — E-grupo — Burgas  
III — E-grupo — Loveč

## GRANDAJ UNUAJ PREMIOJ DE LA REVUO:

Kapka Dečkova — partopreno en la tendarlernejo en Drujevo.

Marieta Ivanova — partopreno en la Internacia Junulara E-Renkonto en urbo Tata, Hungario.

Várbinka Ignatova — partopreno en la E-kursoj en Varno.

Mitoška Stojanova — partopreno en la E-kursoj en Varno.

## LA JUĜKOMISIONOJ:

por la klasoj 1—8:

Violin Oljanov (prezidanto), Ilija Ivanov,<sup>3</sup> Kiril Drajev, Atanaska Papazova, Nedka Petrova.

por la klasoj 9—11, por studentoj kaj civitanoj:

Kunčo Válev (prezidanto), Dimitro Denčev, Marija Trendafilova, Kolju Pančev, Neno Janev.

## Eksperimento de TEJO

El la individuaj membroj de TEJO la procento de la pli junaj ol 18-jaraj estas tre malgranda. Dum komitatkunsidoj de la organizado oni ofte diskutis kiel instigi al membrigo malpli aĝajn gejunulojn. Lige kun tio la estraro vidas du ĉefajn problemojn: nesufiĉe allogaj periodaĵoj kaj altaj membrokotizoj. Tial estis anoncita eksperimento, kiu povus esti sukcesa paŝo al solvo de tiu ĉi demando.

En 1980 TEJO kaj UEA donas dum trijara periodo<sup>o</sup> oferton por novaj individuaj membroj inter 10 kaj 18-jaraĝaj inkluzive. Kiu unufoje pagas unujaran membrokotizon, aŭtomate ricevas dujaran membrecon. Ekde nun ĉiu individua membro ricevas ankaŭ la novan bultenon „Koncize“ kun la ĝeneraltema revuo „Kontakto“.

E. G

La paco estas virto de la civilizacio, la milito — ĝia krimo.

Viktor Hugo

Se vi volas pacon — konstruu ĝin sen indulgi sin, dum ĉiu tago de v.a vivo, dum ĉiu horo de viaj tagoj.

Arnold Coajg

## BULGARA PATRINO PAROLAS

En la solena kunveno de la Sofia E-societo „Maksim Gorkij“, dediĉita al la Internacia Tago de la Virino — la 8 de marto, s-anino Zlatka Elenova di-

rektis al la e-istinoj emocian gratulon. Ni petis ŝin skribi siajn vortojn, kion ŝi faris.

### KARAJ GESAMIDEANOJ,

Mi kore dankas al ĉiuj, kiuj simpatias al mi kaj al mia granda familio. Kaj mi volas diri al vi kelkajn vortojn.

Mi estas feliĉa virino, ĉar mi vivas en paco en mia bela patrolando.

Mi estas feliĉa edzino, ĉar mia edzo estas homo kun ora koro.

Mi estas feliĉa patrino, ĉar mi havas kvin filinojn kaj tri filojn: bonaj, inteligentaj, laboremaj, honestaj. Ili estas kaj amas min.

Mi estas feliĉa avino — kun naŭ genepoj. Kvankam petolemaj, ili estas tre karaj, mildaj, ĝentilaj kaj ĉiuj ĉiam preferas kanti Esperantajn kantojn.

Feliĉa kun tiom da zorgoj, kun tiom da laboro, kun tiom da suferoj eĉ? — Jes, jes, ĉio ĉi ne malhelpis al mia feliĉo. Ĉar la feliĉo dependas nek de riĉeco, nek de lukso, nek de longa ripozo. Ĝi estas, kiel diras la hungara verkisto Andraŝ Faj, trankvilo de la koro kaj reciproka amo.

La amo estas grandega forto. Ankaŭ por mi ĝi estis forto dum tuta mia vivo. Pli forta ol atombombo ĝi estas. Ĉar la atombombo detruas la vivon, kaj la amo kreskigas kaj florigas la vivon.

Virinoj el la tuta mondo, kunigu vin kaj gardu la pacon! Ĉar sen paco ne estas amo!

Karaj esperantistinoj, mi gratulas vin okaze de la internacia festo de la virino kaj ĵurpetegas vin: gardu la pacon!

Oni petis min skribi miajn vortojn. Al tio, kion mi jam diris lige kun la 8a de marto, mi volas aldoni la jenon.

Mia koro ĉiam estis plena de espero. Tiu espero neniam ermesis al mi perdi la tran-

kvilon. Mi estis certa, ke la malsana infano resaniĝos, ke miaj sendormaj noktoj ne estos sen fino. Miaj zorgoj estis ĉiam rekompencataj de la helaj okuloj, de la belaj ridetoj, de la agrabla babilado de miaj infanoj.

Ne estas vivo sen sufero. Oni ne devas timi la suferon! Oni devas scii suferi, kiel oni scias ĝui. La ĝojo sekvas la suferon. Ĉio pasas: ne nur la bono, sed ankaŭ la malbono.

La laboro ĉiam estis kaj estas por mi kreado. Prepari bongustajn manĝaĵojn kun ĝojo, kun amo, kun la penso, ke mia edzo kaj miaj infanoj manĝos kun plezuro, — tiu ĝojo donis al mi forton. Kaj kiam iu el miaj infanoj diris: „Panjo, neniu povas kuir kaj pretigi manĝotablon kiel vi!“ — mi estis ne nur ĝoja, sed ankaŭ feliĉa!

Kiam el iu malpurajo aŭ ĉifonitaĵo mi faris ajon puran, gladitan, brilantan, kiel novan, neniam mi pensis, ke lavi, gladi, fliki, purigi estas „nigra“ kaj humiliga laboro. Nel Tio estas kreado. Ĉar tio ĝojigas min. Ĉar mi ŝansas la malbelon en belon. Por mi tio estas feliĉo!

„Ho, kiom malmulte ŝi bezonas, por esti feliĉa!“ — kun malica rideto diros iu.

Jes, al ĉiu el ni mankas io tre malmulta, por esti feliĉa. Al iu — ankoraŭ iom da amo, al alia — ankoraŭ iom da pacienco, al tria — ankoraŭ iom da estimo, al kvara — ankoraŭ iom da boneco, al kvina — ankoraŭ iom da sindediĉo, al sesa — ankoraŭ iom pli da hela rigardo — por ĝui la belecon de la mondo. Ĉiam ankoraŭ io malmulta krom tio, kion oni jam havas.

Vespere, kiam la tuta familio estis kolektiginta hejme, kiam la ĝojo plenumi-

gis la koron, kiam la edzo diris: „Post la longa labortago — finfine hejme. Ĉi tie estas la paco, ĉi tie estas la ripozo, ĉi tie estas la amo, la estimo, la feliĉo“ — mi estis feliĉa.

Kiam mi estis juna kaj havis nur kvar infanojn, malnova amiko — tre inteligenta, tre kultura, tre instruita kaj kun riĉa animo — dum konversacio diris al mi: „Mi miras, kial kelkaj homoj admiras pentriston, kiu pentris belan infanon, kaj diras: rigardu, tiu infano kvazaŭ ekparolos. Kaj kiam la samaj homoj vidas patrinon kun infano, kiu parolas, marŝas, ridas, saltas, dancas, estas bela kiel papilio, ili ne miras, opiniante, ke tio estas tute natura.“

Ĉar la patrinoj kaj la infanoj estas multaj, multaj en la mondo — pensis mi.

Sed tio ne estas kaŭzo por ne admiri la partinojn kaj la infanojn. Male: oni devas admiri kaj protekti kaj ami, ami ilin!

Esti patrino ne estas facila afero. Ne estas facile ankaŭ esti edzino. La virinoj devas posedi la arton esti bonaj edzinoj kaj bonaj patrinoj. Mi ne volas paroli ĉi tie pri la viroj. Mi diros nur, ke ili ankaŭ devas posedi la arton esti bonaj edzoj kaj bonaj patroj.

Tiel ni ĉiuj vivas en reciproka amo, en estimo kaj kun trankvila koro. Kaj ankaŭ niaj gefiloj kaj niaj genepoj kreskos kaj prosperos en amo, en paco, en feliĉo.

Zlatka ELENOVA

Neniu el tiuj, kiuj ne havas lilojn, scias kio estas milito.

Jozef Mestr

La milito estas infekta. . . Izolu la agresulojn!

Franklin Ruzvelt

## ИЗМЕНЕНИЯ В УСТАВА НА БЕС

Проект

Бюрото на ЦР на БЕС в заседанието си от 31. III. 1980 г. (протокол № 68) реши да предложи на 40-ия конгрес на Българския Есперантски съюз в Пловдив някои целесъобразни промени и допълнения и устава, който е в сила сега.

### СЕГАШЕН ТЕКСТ:

Чл. 2 а) издава печатни органи.

е) Членува колективно в Отечественния фронт и влиза във връзка с организации, които биха допринесли за целите на Българския Есперантски съюз.

ж) Подпомага секциите си за установяване контакт със сродни организации в други страни за общи мероприятия.

Чл. 7, ал. II. От редовете на съюза се изключват членове, които в продължение на една година не са си платили членския внос и след двукратно писмено напомняне не сторят това.

Чл. 8. Българският есперантски съюз учредява значка за награждаване на заслужили и отличили се есперантисти. За изключителни заслуги към есперантското движение отделни лица могат да бъдат провъзгласени за почетни членове на съюза или на отделно дружество. Почетните членове получават даром издаваната на съюза.

Чл. 10, ал. II. Делегатите на конгреса се избират на окръжни конференции, като отделните дружества бъдат представени съответно броя на отделните членове.

Чл. 12. Между конгресите могат да се свикват (при необходимост) от ЦР национални, окръжни и междуокръжни конференции. Националните конференции имат право да извършват промени в състава на централните органи на съюза.

Чл. 14. ЦР на БЕС:

а) осъществява ръководството и дейността на съюза;

б) утвърждава проектобюджета и общия план за работата на БЕС през годината.

Чл. 16. ЦР на БЕС се представлява пред всички организации, учреждения и институти в страната и в чужбина от председателя на съюза, а в негово отсъствие от зам. председателите, от секретарите или от упълномощените от Бюрото на ЦР на БЕС лица.

Чл. 18. Централното ръководство избира из своя състав Бюро от 7 до 11 души. ЦР определя председателя, зам. председателите и секретарите, които се конституират като секретариат.

Чл. 20.

Чл. 23, ал. II. Окръжното ръководство се състои от 9 до 55 души. От своя страна то избира бюро от 5 до 9 души, председател, зам. председател и секретар. Председателят и секретарят се утвърждават от Централното ръководство на БЕС. Окръжната контролна комисия се състои от 3 до 7 души. Тя си избира председател.

Чл. 24. ОР ръководи цялостната работа на дружествата в окръга между отчетно-

### НОВ ТЕКСТ:

Чл. 2 а) издава списания, бюлетини, книги и др.

е) Членува колективно в Отечественния фронт и влиза във връзка за съвместна дейност с организации, които биха допринесли за целите на Българския есперантски съюз.

ж) Подпомага морално и материално секциите си за установяване на контакт със сродни организации у нас и в други страни за общи мероприятия;

Прибавя се нова буква:

и) Урежда чрез Международната есперантска школа в учебните бази на БЕС обучение по есперанто за българи и чуждестранни граждани и участието на български есперантисти в мероприятията в чужбина.

Чл. 7, ал. II. От редовете на съюза отпадат членове, които в продължение на две години не са платили членския си внос и след акуратно писмено напомняне не са сторили това.

Чл. 8. Българският есперантски съюз учредява почетна значка за награждаване на заслужили и отличили се есперантисти. За изключителни заслуги към есперантското движение от страна на отделни лица пленумът на Централното ръководство на съюза може да даде званието „почетен председател“, „почетен секретар“ или „почетен член“ на Съюза или неговите подразделения.

Чл. 10, ал. II. Делегатите на конгреса се избират на окръжни конференции измежду активистите от окръга.

Чл. 12. При необходимост, между конгресите ЦР може да свиква национални, окръжни и междуокръжни конференции по актуални проблеми на дейността на БЕС.

Чл. 14. Пленумът на ЦР на БЕС:

а) осъществява ръководството и дейността на съюза;

б) утвърждава проектобюджета и общия план за работата на БЕС през годината;

в) извършва промени в състава на централните органи на съюза.

Чл. 16. Пред всички организации, учреждения и институти в страната и в чужбина ЦР на БЕС се представлява от председателя на съюза, а в негово отсъствие от главния секретар или от зам. председателите.

Чл. 18. Централното ръководство избира от своя състав бюро от 7 до 13 души. ЦР определя председателя, главния секретар, зам. председателите и секретарите, из състава на които се конституират секретариат.

Към чл. 20, след ал. II се прибавя нова, а досегашната ал. III става ал. IV. Новата ал. III гласи:

Препоръките по нередностите и пропуските на ЦКК са за длъжителни за ЦР на съюза.

Чл. 23, ал. II: Окръжното ръководство се състои от 9 до 61 души. От своя страна то избира бюро от 5 до 11 души, председател, зам. председател и секретар. Председателят и секретарят се утвърждават от ЦР на БЕС.

Окръжната контролна комисия се състои от 3 до 7 души. Тя си избира председател и секретар.

Чл. 24. ОР ръководи цялостната работа на дружествата в окръга между отчетно-изборните конференции и се събира най-много два пъти в годината.

Конференцията извършва при необходимост промени в състава на бюро, организира, направлява и координира стопанската дейност на територията на окръга.



изборните конференции и се събира най-много два пъти в годината.

Бюрото на ОР работи по план, който се одобрява от ОР. Препис от плана се изпраща за сведение в ЦР на БЕС.

**Чл. 28.** В градовете, където има повече от едно дружество, се образува градско ръководство от представители на дружествени ръководства. В окръжните градове ОР не се образуват, а техните функции се изпълняват от бюрата на окръжните ръководства. За задачите на окръжните и общински ръководства ЦР на БЕС изготвя специална инструкция.

**Чл. 29.** Основна организационна единица на БЕС е дружеството. Изграждането на дружествата става както териториално, така и в предприятия и учреждения, учебни заведения, институти и др.

За учредяване на дружество е необходимо да има най-малко пет учредители. На учредително събрание се изготвя протокол в три екземпляра, който се подписва от учредителите. По един екземпляр се изпраща на ЦР и ОР. Най-късно в месечен срок от получаването на протокола ОР (ОГР) е длъжно да се произнесе за утвърждаването и писмено да уведоми за това дружеството и ЦР на БЕС.

**Чл. 30.** Организационните събрания на дружеството се свикват не по-рядко от един път на три месеца.

Годишните отчетни събрания на дружествата се свикват по указание на ЦР на БЕС. На тях се разглежда и приема годишният отчет и план за работа, избира се ново ръководство и контролна комисия. Числото и съставът на ръководството се определят от годишното отчетно събрание, а председателят и секретарят на същото се утвърждават от ОР на БЕС.

**Чл. 32.**

**Чл. 34.** Печатите на ЦР, ОР и ОР, както и на дружествата, са кръгли, в средата с петолъчка, в която има буквата Е, а наоколо надпис:

За ЦР на БЕС — Bulgara esperantista Asocio — Centra Estraro; за ОР на БЕС — Distrikta Estraro de BEA, следвано от името на града; за дружествата — Esperantista Societo, следва името му и името на селището.

**Чл. 35.** БЕС набира своите средства от:

- а) членски внос, чийто размер се определя от конгреса или от националната конференция;
- б) субсидии от държавата и народните съвети;
- в) от различни мероприятия.

**Чл. 36.** При ликвидация на дружествата, ОР, ОР или секция на БЕС, архивата, имуществото, включително и паричните средства се предават на съответния висшестоящ орган.

**Чл. 28.** В градовете, където има повече от едно дружество, се образува общинско ръководство от представители на дружествените ръководства. Те си избират председател и секретар, които се утвърждават от ОР.

В окръжните градове общински ръководства не се образуват, а техните функции се изпълняват от бюрата на окръжните ръководства.

За задачите на окръжните и общинските ръководства ЦР на БЕС изготвя специална инструкция.

**Чл. 29.** Основна организационна единица на БЕС е дружеството. Изграждането на дружествата става както териториално, така и в предприятия, учебни заведения и др.

Дружествата на съюза, респ. ОР, разрешават на своите членове да образуват клубове и други подобни форми в читалища, профсъюзни домове на културата, училища, младежки домове и други институти, където намират поле за дейност.

За учредяване на дружество е необходимо да има най-малко пет учредители. За учредителното събрание се изготвя протокол в три екземпляра, който се подписва от учредителите. По един екземпляр се изпраща на ЦР и ОР. Най-късно в месечен срок от получаването на протокола ОР (ОГР) е длъжно да се произнесе за утвърждаването и писмено да уведоми за това дружеството и ЦР на БЕС.

**Чл. 30.** Организационните събрания на дружествата се свикват не по-рядко от един път на три месеца.

Годишните отчетно-изборни събрания на дружествата се свикват по указание на ЦР на БЕС. На тях се разглежда и приема годишният отчет и планът за работа, избира се ново ръководство и контролна комисия, а при нужда и делегати за окръжна конференция.

Числото и съставът на ръководството се определят от годишното отчетно-изборно събрание, а председателят и секретарят на същото се утвърждават от ОР, ОГР и ООР на БЕС.

**Към чл. 32 се добавя нова ал. II :**

Младежите-есперантисти от всички дружества на БЕС се обединяват в секция „Българска есперантска младеж“ (БЕМ), която се ръководи непосредствено от ЦР на БЕС.

**Чл. 34.** Печатите на ЦР, ОР, ОР и ООР, както и на дружествата, са кръгли, в средата с петолъчка, в която има буква Е, а наоколо надпис:

за ЦР — Bulgara Esperantista Asocio — Centra Estraro;  
за ОР — Distrikta Estraro de BEA, следвано от името на града;

за ООР — Distrikta-Urba Estraro de BEA, следвано от името на града;

за ООР — Komunuma Estraro de BEA, следвано от името на града;

за дружествата — Esperantista societo, следва името на дружеството и на селището.

**Чл. 35.** БЕС набира своите средства от:

- а) членски внос, чийто размер се определя от конгрес или от национална конференция;

- б) субсидии от държавата и народните съвети, стопанисване на собствени имоти, имущества, дарения и завещания;

- в) от различни мероприятия, провеждани от съюза и неговите подразделения.

**Чл. 36. (изцяло нов)**

Право да придобиват собственост имат БЕС, окръжните, окръжно-градските и общинските есперантски организации, дружествата, Международната есперантска школа и др. по решение на ЦР на БЕС.

## VI. Общи положения

**Чл. 39.** Българският есперантски съюз е самостоятелна юридическа личност със седалище в гр. София.

Настоящият устав е приет на 32-ия конгрес на БЕС в София (1955 г.); изменен и допълнен от 33-ия конгрес във Варна (1958 г.), 34-ия конгрес във В. Търново (1960 г.), 35-ия конгрес в Бургас (1962 г.), 36-ия конгрес в Плевен (1964 г.), 37-ия конгрес във Варна (1968 г.), 38-ия конгрес в Смолян (1972 г.), 39-ия конгрес в Русе (1976 г.), 40-ия юбилейен конгрес в Пловдив (1980 г.).



Estis ĝuste antaŭ kvardek du jaroj, kiam en la freŝa numero de „Bulgara Esperantisto“ mi traŝigis artikolon pri la okazonta kongreso de BEA en la nordbulgara urbo Sevlievo. Mi entuziasmiĝis viziti la kongreson, sed... Kiamaniere? Mono mankis. Mi estis tabaklaboristo kaj ĝuste dum tiu ĉi somero ni strikis. Mi decidis piediri. Mian intencan mi malkovris al k-do David Sasonov. Li proponis al mi malgrandan sumon el la societa kaso por aĉeti mangajojn dum la kongreso. Ankaŭ mia kolego Stefan Margaritov decidis akompani min.

La 12an de julio, merkredo je la kvara matene, kun tornistroj sur la dorso kaj kun verdaj flagetoj en manoj ni ekmarŝis al Plovdiv. Tie ni renkontis k-don Ĥrma, kiu informis nin, ke grupo da junuloj, ĉefe lernantoj, intencas veturi ĝis Karlovo kaj de tie piedmarŝi al Sevlievo.

De Plovdiv ĝis Karlovo la distanco estas 60 km — sufiĉe longa vojo. Sed pro la granda deziro atingi ĝustatempe la kongresurbon ni ne sentis lacigon kaj la bruligantajn radiojn de la suno. Sur niaj ŝultroj kvazaŭ estis flugiloj. Jam estis nokto, kiam ni atingis Karloven.

Dormi en hotelo ni eĉ ne pensis. Vagante tra la stratoj, ni haltis antaŭ lunoĉejo. La mastro rimarkis nin kaj afable invitis eniri. Stefan klarigis al li nian situacion kaj petis, ke ni tranoktu en la butikoj.

— Kial en la butikoj? Vi tranoktos en mia hejmo, — diris li.

Kompreneble, ni tuj konsentis. Bedaŭrinde, ni ne rememoras la nomon de tiu gastama karlovano, kiu tiel montris sian simpatian al Esperanto.

Jaŭde matene ni adiaŭis la familion de nia gastiganto kaj konatigis kun la vidindaĵoj de la urbo — la naskigdomo de V. Levski, lia monumento kaj la proksima akvofalo. Tagmeze ni direktigis al la stadidomo por renkonti la kongresanojn el Plovdiv. Dum la vojaĝantoj elvagoniĝis, ni svingis la flagetojn. Ĉiuj preterpasis nin indiferece krom la junulo, kiu alparolis nin en E-o. Li informis nin, ke ĉiuj kongresanoj el Plovdiv veturos per trajno ĝis Gabrovo kaj de tie per aŭtobuso aŭ piede al Sevlievo.

Triope ni ekmarŝis kaj post kelkaj horoj atingis la monaĥejon apud urbo Kalofer. Pro la polvorica vojo ni similis al muelistoj kaj Stefan proponis, ke ni banu

nin en la proksima rivero. Ni volonte senvestiĝis kaj saltis en la agrebla malvarmetan akvon. Stefan lerte kaptis fiŝojn kaj jetis ilin sur la bordon. Subite venis arbargardisto kaj minace demandis:

— He, ĉu vi posedas rajtigilon por fiŝkapti?

Car ni ne posedis tian, li ordonis, ke ni sekvu lin en la monaĥejon. Eksciinte pri tio temas, la vicprioro, juna kiel ni, klarigis al la gardisto, ke ni iras al la kongreso de E-o kaj, ĉar senmonaj, volis gustumi forelojn. La gardisto kompreninte, ke li ne povas mompuni nin, prenis la fiŝojn kaj foriris.

La vicprioro disponigis al ni ĉambron kun litoj, gastigis nin per pano kaj fazeolo. Ni satdormis. La sekvan matenon en la korto de la monaĥejo nin atendis maljuna monaĥo. Li montris al ni konvenan vojon por transiri la Balkanon.

Kun novaj fortoj ni vigle ekgrimpis al la montopintoj. Blovis malvarma venteto kaj tio faciligis nian supreniron. Ĉe la fonto de rivero Tunga ni faris mallongan ripozon. Baldaŭ ni ekgrimpis denove kaj ĝuis la nekovritan supron Mara Gidik. Tie ni faris fotojn kaj daŭrigis la vojon malsupren. Neatendite ni trafis amastombejon de rusaj soldatoj, pereintaj ĉi tie dum la milito por liberigo de Bulgario el osmana jugo. Ni demetis la tornistrojn kaj klinis la kapojn antaŭ la nekonataj herooj. Tiam neniu el ni supozis, ke pasos nur ses jaroj kaj la bravaj nepoj de la pereintoj venos nian landon por liberigi nin, ĉi-foje el sub faŝista tiraneco.

Ni tagmanĝis en la montodomo sub pinto Mara Gidik. Pro laciĝo miaj kamaradoj ekdormis, sed post nelonge mi vekis ilin kaj ni komencis descendi. Survoje ni renkontis vilaĝanojn, kiuj zorgis pri siaj bienetoj. Ni alvenis vilaĝon Novo Selo. Tie al ni aligis tripersonan grupon kun tornistroj surdorse. Granda estis nia ĝojo, kiam ni eksciis, ke ankaŭ ili celas la kongresurbon. La triopo — du junuloj kaj unu fraŭlino — estis studentoj en la pedagogia instituto de urbo Kazanlak. Ili proponis al ni pli mallongan vojon al Sevlievo.

La sekvan matenon ni jam estis en la kongresurbo. Multloke fliris verdaj standardoj. Antaŭ la kongresejo gee-istoj el diversaj lokoj bonvenigis nin. En la akcepteja komitato de LKK zorgis pri nia loĝigo. Kiam la veterano de sevlievaj e-istoj Doĉo Stanev ek-

sciis, ke ni transiris piede la Balkanon, li entuziasme salutis nin, forte skuante niajn manojn. En la noktejo ni trovis konatajn kamaradojn el Plovdiv kaj Asenovgrad — David Sasonov kun sia fratino Mara, Dimitro Andreev, Ĥrma, Ahmed Askerov, Slavko Georgiev.

La interkona vespero okazis en la Domo de la Casistoj, ornamita per diverskoloraj girlandoj. Tie mi havis la feliĉan konatigon kun elstaraj e-istoj kiel Asen Grigorov, Trajana Petkova, Svilen Sokolov k. a.

En la tago de la inaŭguro ni konstatis, ke faŝistoj disŝiris la verdajn standardojn kaj kongresafişojn, kio forte indignigis ĉiujn kongresanojn. Kamarado Simeon Hesapčiev plendis al la polico, sed senrezulte. Male, ankaŭ la polico havis sian surprizon por ni — ĝi malpermesis, ke oni parolu en E-o. Malgraŭ ĉiuj obstakloj la kongreso finis sukcese sian laboron. Antaŭ ol disiĝi ni faris multajn fotojn. Mi kaj Stefan denove kaptis la vojon al la Balkano. Al ni aligis hungara e-isto, kiu ĉeestis la kongreson kiel gastoj. Kiam ni malsupreniradis al la monaĥejo apud Kalofer, subite ekpluvegis. Por ŝirmi nin, ni kaŝis nin sub centjara kverko. Tamen tio ne helpis. Baldaŭ ni forlasis la gigantan kverkon, timante pereii pro la teruraj fulmotondroj. Aŭdinte timigan mugadon, ni tuj travadis la riveron. Apenaŭ ni faris tion kaj vidis, kiel grandegaj ondoj kuregas malsupren, trenante arbotrunkojn kaj ŝtonegojn.

— Ni havis bonŝancon! — triumfis Stefan. — Alkaze ni devus atendi ĉi tie kelkajn horojn.

Malsekaj ĝisoste, ni eniris la monaĥejon. Tie ni trafis grupon da gelnantoj, kiuj invitis nin al sia mangotablo. Eksciinte, ke inter ni troviĝas hungaro, ili surŝutis lin per demandoj. Li rakontis pri la vivo en Hungario kaj pri la E-movado en sia lando. En la monaĥejo denove ni tranoktis.

La sekvan matenon ni direktigis al Karlovo kun la intenco ĝis Plovdiv piediri denove. En la stadidomo tamen nin trafis k-do Dimitro Andreev, kiu aĉetis por ni veturbiletojn ĝis Asenovgrad.

La belaj impresoj de la kongreso kaj la kongresurbo restis por ĉiam en mia memoro, tial mi surpaperigis ilin, por ke la juna generacio sciu, kiel ni iam veturis al E-kongresoj.

Atanas GAEV

## LA SORTO DE VOLAPUKO EN BULGARIO

Antaŭ precize unu jarcento Johann Martin Schleyer (Slajer), katolika pastro en Litzelstetten (Litzelesten), Germanio, publikigis la unuajn informojn pri sia internacia lingvo Volapük. En 1879 li estis revelacie inspirita solvi la problemon de interkomunikado trans lingvaj bariloj per planlingvo, kiu fariĝis unu el la du atingintaj sukcesoj en la 19a jc. La unuaj artikoloj, havantaj skizon de la vortprovizo kaj strukturo de Volapuko, aperis en „Sionsharfe“ (Ciona Harpo) — revuo redaktita kaj eldonita de Patro Schleyer mem, kies enhavo konsistis el religia poezio. En 1880 estis publikita la unua gramatiko de Volapuko, kaj en la sekva jaro — la volapuka-germana vortaro. Samjare Schleyer komencis redakti „Volapükabed“ — la unuan volapukistan gazeton.

En la unua tempo la nova internacia lingvo disvastiĝis inter germane parolantoj en Germanio kaj Aŭstrio. Poste ĝi penetris en slavajn landojn, unue en la Rusan Imperion pere de ruslandaj germanoj. La unua ruslingva propaganda broŝuro, verkita de du balt-germanoj — F. Waldmann kaj A. Slefocht, estis eldonita en 1884 en Brno, tiutempe en Aŭstrio. Komence de 1886 aperis en Sankt-Peterburgo la unua ruslingva lernolibro pri Volapuko de A. S. Suvorin. Sekvis ĝin en la sama jaro pli da gramatikoj kaj ankaŭ vortaro.

La jaro 1886 estis grava ankaŭ en la historio de la volapuka movado en Bulgario. La Slajera lingvo venis Bulgariion el Ruslando, kaj la unua bulgarlingva lernilo, titolita „Volapük, sistemigita elmeto de la fundamentoj de Tutmonda Lingvo“ estis tradukaĵo de rusa verko, eldonita en Moskvo fare de nekonata aŭtoro. La tradukinto kaj sendube la unua volapukisto en Bulgario estis Krästju Ivanov Mirski, advokato kaj deputito el Varno. Mirski pretigis ankaŭ 3000-vortan vortaron, sed ĝi verŝajne neniam aperis. La dua volapuka lernolibro — „Gramatiko de la universala lingvo Volapük“, verkita de P. A. Sapunov el Sviŝtov, estis publikita en Sofio en 1889. Akompanis ĝin granda volapuka-bulgara vortaro kun 14 000 vortoj. La bulgara gazetaro helpis per favoraj artikoloj la disvastigon de Volapuko en la lando dum la jaroj 1887—1889. En 1889 oni eĉ anoncis eldonon de bulgara volapukista gazeto, sed tiu plano neniam efektiviĝis, ĉar jam en tiu jaro la volapuka movado estis disfalanta.

Aliaj frutempaj volapukistoj en Bulgario estis M. Seizov, gimnazia instruisto (Veliko Tŕrnovo), Velika Ivanova (Samokov), D. Delčev (Kjustendil), Boris Cankov, doganisto (Sviŝtov) kaj Nikola Zlatev, apotekisto (V. Tŕrnovo). Lernis Volapukon ankaŭ Kliment, metropolito de Veliko Tŕrnovo (la verkisto Vasil Drumev) kaj lia nevo Dimitro Drumev, oficisto.

Post la apero de la Unua Libro de d-ro Esperanto, en pluraj landoj, kie estiĝis volapuka movado, la adeptoj de Volapuko transiris al la lingvo de Zamenhof. Tiel la volapuka movado havis signifoplenan rilaton al la E-movado, ĉar multaj homoj rolis kiel pioniroj en ambaŭ movadoj. Unu el tiuj homoj estis F. V. Lorenz el Ĉeĥoslovakio, kiu instruis en Prago unue Volapukon kaj poste Esperanton. En Pollando Antoni Grabowski estis fervora volapukisto, sed baldaŭ li seniluziĝis pro la malfacila komunikebleco de Volapuko. Plej okulfrapa ekzemplo estis la Mondlingva Klubo en Nurnbergo, fondita de volapukistoj, kiuj amase akceptis E-on en 1888. Tiu fenomeno okazis ankaŭ en Bulgario. Laŭ Ivan Sarafov en lia „Skizo de la historio de la Bulgara E-Movado“, ĉiuj frutempaj volapukistoj listigitaj ĉi-supre, krom M. Seizov, fariĝis e-istoj. Ankaŭ la volapukista grupo en Veliko Tŕrnovo tutmembe aliĝis al E-o.

La influo de tiom da eksvolapukistoj en la frua bulgara E-movado ne estas subtaksenda. Ernest Dzezen (USSR) en sia „Historio de la mondlingvo“, substrekas, ke tiuj volapukistoj, kiuj fariĝis e-istoj-reprezentis la plej progreseman parton de la volapuka movado, do ilia influo estis pozitiva: ili jam konvinkigis pri la praktikebleco de internacia lingvo kaj havis sperton propagandi favore al ĝi. Kiel elstara ekzemplo en Bulgario estas menciinda Krästju Mirski, intelektulo kaj sociaganto en Varno, kiu tradukis la unuan lernolibron de Volapuko en la bulgaran lingvon. Li esperantistiĝis en 1899 kaj publikigis tradukaĵon el la rusa lingvo de „Koncizaj informoj pri la internacia lingvo Esperanto“, verkita de d-ro Zamenhof.

Kio okazis al la volapuka movado en Bulgario post la enradikiĝo de E-o en tiu lando? Historiisto de la bulgara movado skribas jene:

„Tamen la pere de Volapuko ne estis tuja. Fakte ĝi estis iom-post-ioma formorto, ĉar laŭ la rememoroj de G. Georgiev ekzistis gimnaziano en Sofio, kiu sekrete de la lernejaĵ instancoj lernis Volapuk-on eĉ en 1897. Iom poste, en 1901, Hristo Totev Rjaĥovski aĉetis Volapuk-lernolibron.“ (Canko Murgin, „Historio de la bulgara E-movado“, p. 7).

Mi nun faras tiun ĉi demandon: Ĉu Volapuko tute malaperis en Bulgario? Oni scias, ke okaze de la skismo inter la volapukistoj-reformemuloj kaj la volapukistoj, kiuj apogis Schleyer, la volapuka movado ne povis elteni plu kaj ĉie en la mondo ĝi perdis vivkapablon nur unu jardekon post la lanĉo de la lingvo. Tamen kelkaj fidelaj adeptoj rifuzis lasi Volapukon iri al la transa mondo kune kun sia aŭtoro, kiu mortis en 1912. De la 1930aj jaroj ĝis hodiaŭ volapukistoj kaj „volapükafens“ (amikoj de Volapuko) daŭrigis la uzon de la Slajera lingvo, kvankam ne en ĝia originala formo. La reformemuloj finfine venkis kaj sukcesis substitui sian version de Volapuko al la klasika idiomato de Patro Schleyer.

Okaze de la centjara datreveno de Volapuko en 1979, la nuntempaj volapukistoj faris klopodojn honori Johann Martin Schleyer kaj samtempe revivigi interesiĝon pri lia lingvo, por ke ĝi ne estu tute forgesita dum la venontaj 100 jaroj. Lastatempe mi provis fari popolnombrodon de la hodiaŭaj volapukistoj: laŭ mia enketo maksimume dek individuoj estas konataj al mi kaj al la aliaj samlingvanoj. Ili loĝas en Anglio, Brazilo, Francio kaj Nederlando. Povas esti, ke aliaj izolitaj volapukistoj kaŝas sin ie kaj tie. Eble kelkaj troviĝas ankaŭ en Bulgario, sed kiu konas ilin?

## FUNEBRAJ SCIIGOJ

Kun ĉagreno ni sciigas, ke lastatempe kelkaj aktiva samideanoj forlasis niajn vicojn:

CANKO KOLEV — 65-jara, el Sofio, muzikologo, aŭtoro de lernolibroj kaj publikaĵoj en sia fako, multjara membro de la Instruista Sekcio de BEA kaj estrarano de la Sofia Instruista E-Societo „Diĉo Petrov“;

GEORGI DOKOV el Sofio, gvidanto de E-kursoj, prezidanto de la Teknikista Sekcio de BEA;

VÄLCAN MANOLOV JANEV — 58-jara, el D mitrovgrad, multjara estrarano de la E-societo en la urbo; METODI POPOV — 74-jara, el Kjustendil, eksa di. rektoro de gimnazio kaj de Instruista Instituto, multjara prezidanto de la loka E-societo kaj de la Distrikta Estraro de BEA.

Niajn kondolencojn!



## KIAJ ESTAS LA ROZOJ EN MONJERON?

*Rakonto pri virino el Leningrado, al kiu oni sendas salutojn el ĉiuj kontinentoj*

Si naskiĝis en Peterburgo kaj vidis du militojn. Unue estis laboristino en uzino, poste fariĝis pentristino. Kaj ĉiam ekde la tempo, kiam oni instruis al ŝi la fundamentojn de Esperanto, ŝi parolas kaj skribas en tiu ĉi lingvo, ĉar ŝi kredas, ke ĝi estas necesa al la homoj. Iu kukiaristo el Barcelono kaj la ŝuisto Stefan el Vieno estis ŝiaj unuaj korespondantoj dum la antaŭmilitaj jaroj. Hodiaŭ ŝi estas membro de la komisiono pri renkontoj de fremdlandaj E-istoj ĉe Leningrada Domo de Paco kaj Amikeco kun la popoloj el eksteraj landoj kaj akceptas centojn kaj centojn da homoj, montras al ili Leningradon, rakontas pri nia vivo kaj kredas: estas eble fari tiel, ke sur la tero ĉiam estu paco.

Mi konas ne nur unu rakonton el la vivo de Varvara Petrovna Cvetkova. Tamen komencos mi ne per tiuj, en kiuj delonge ĉefa heroo estas ŝi, kaj kiuj jam havis por mi siajn titolojn: „Gardeno en Monjeron“, „Ŝuisto el Vieno“, „Kazi en Djuni“. Por ke oni komprenu, de kie devenas ĉi eksterlandaj nomoj de urboj kaj agantaj personoj, mi tuj klarigos: Varvara Petrovna ekde sia juneco estas fidela al la ideo de la internacia lingvo Esperanto; ŝi havas 150 konstantajn korespondantojn en ĉiuj landoj, instruis tiun ĉi lingvon al multaj homoj, donante al ili rimedon por kontakti kun la vasta mondo. Cio ĉi instigis min rakonti pri ŝi.

Sed super ĉiuj temoj kaj antaŭ ĉiuj temoj estu la periodo de ŝia vivo en la sieĝita Leningrado.

En infangardeno n-ro 44 la infanoj de tri ĝis sesjara aĝo restadis tutan semajnon. Nur dimanĉe la patrinoj vizitis ilin, dum ĉiuj ceteraj tagoj kun la infanoj ludis kaj zorgis pri ili edukistoj, vartistinoj kaj ankaŭ du virinoj Varja\*: Varja-muzikantino kaj Varja-pentristino. Varja Litvinova, ĉirkaŭvintse sin en tuko, ludis pianon, instruis la infanojn danci. Varja Cvetkova, kiun oni nomis ankaŭ „Petroviĉ“ (ne nur pro tio, ke ŝi ordinare estis en pupantalo kaj vataĵo, sed ankaŭ pro tio, ke ŝi scipovis segi, raboti, ĉarpenti), preparis al la infanoj kostumojn por teatraĵo. Ŝi vestis ilin kiel soldatojn-rugarmeanojn, faris por ili kaskojn kaj botojn el densa teksaĵo. Foje kune kun ili ŝi faris tankon, kolorigis ĝin kiel veran — kaj la infanaro direktigis al koncerto

en hospitalo. Gis tiu momento la infanoj jam prezentis programojn en diversaj hospitaloj, sed ĉiam en proksimeco, en sia urboparto Petrogradskaja Storo-na; nun ili veturis tra la tuta urbo, al Vasilievskij Ostrov. Veturis! Ĉar por ĉi okazo al ili estis sendita vera ĉevalo, la infanoj sidigis en sledo kaj post ili, en malgranda sledeto, veturis ilia tanko! Tiel laŭ granda ponto, tra glaciokovrita rivero, laŭ kvietaj stratoj, meze de la borderŝtonoj, la infanaro veturis al hospitalo, por ke tie la malgrandaj soldatoj legu poeziaĵojn kaj plenumu kantojn pri braveco al vunditaj soldatoj — kaj la fortoj de la veraj soldatoj plimultigu por defendi tiujn infanojn, por ke kresku la malamo al la malamiko pro la forrabita infaneco de la etuloj.

— ... Mi fieras, — diris Varvara Petrovna, montrante foton de infanoj, starantaj antaŭ de ŝi pentrita muro de infangardeno, — ke dum la pezaj tagoj de la blokado mi povis havigi ĝojon al tiuj ĉi infanoj.

En la infangardenon ŝi venis en la vintro de la kvardekdua, kiam ŝi ne plu havis fortojn iri al la ĝisnuna laboro, kaj kiam ĉi laboro mem malaperis: la bomboj detruis unu post alia la azilojn de „Izor-ram“\*\*, kie ŝi lernis kaj laboris. La lasta ŝia tasko estis ellabori fosforeskajn insignojn: ankaŭ nun la homoj, travivintaj la blokadon, memoras, kiel ili moviĝis tra la mallumo, tuŝante la murojn, kiel ili laŭ memoro trovis la vojon, komprenante, ke kontraŭ ili venas homo nur laŭ la lumanta punkto — insigno sur refaldo aŭ bereto.

En „Izoram“ oni lernis desegni, skulpti, pentri. La diplomlaboro de Cvetkova estis la pentraĵo „Kalinkin-ponto. Konstruado de barikadoj“. Ankaŭ nun en la urba muzeo pendas ŝia afiŝo „Popolaj volontuloj“. Do ŝi devis fariĝi portretisto — tion oni profetis al ŝi en „Izoram“. Sed longan tempon laboris por Cvetkova fariĝis la sitelo kaj la peniko de kolorigisto. Post la milito ŝi ornamadis per sia arto la internajon de infangardenoj: maljuna patrino kaj eta filino enmane. ... Poste ŝi longe laboris en la ateliero de la Pentraarta Fonduso. Sed dum la tuta tempo dua okupo de Varvara Petrovna estis la disvastigo de la ideoj de Esperanto — la komunikigado de homoj el ĉiuj anguloj de la tero per komprenebla por ĉiuj lingvo.

... Finiĝis la milito kaj Varvara ricevis leteron de Stefan el Vieno. Kun li ŝi komencis korespondi en marto 1930 kaj ŝiajn leterojn oni memoris kune kun la siringodoro sur Marsovoe Pole, kun la senvizieraj maristoj ĉe la kanaloj, kun la juneco. ... Kaj ĉio ĉi estis tiel malproksima. Sed la ŝuisto el Vieno sendis leteron, kaj ĝi trafis la adresatinon, malgraŭ ke ŝia unua loĝejo delonge jam ne ekzistis.

Ĉiun merkredon vespere, jam multajn jarojn, dek — dekkvin homoj sidigis ĉe granda tablo en la domo de Cvetkova kaj okazis lecionoj. Varvara Petrovna estas altstatura, ŝi tenas rekte la spinon, apenaŭ jetinte malantaŭen la kapon kun mallonge tondita hararo. Ŝi estas en longa robo kaj malpeza trikota bluzo. Ŝia voĉo estas malrapida, juna, laŭta. Kun agraba prononco pro la kutimo paroli en Esperanto — tiu ĉi lingvo postulas prononci la vortojn precize, tiel kiel oni ilin skribas, sen engluti aŭ moligi, aŭ redukti la sonojn.

V. Cvetkova en vigla interparolo kun E-aktivuloj Neli Kublanova kaj la studento Niko.



\* Varja — karesnomo de Varvara.

\*\* „Izoram“ — mallongigo de Pentraarto por Laborista Junularo.

## DENOVE PRIPACA EKSPOZICIO EN SAMARKANDO

Sur tre granda tablo estas amasego da impresaj ilustritaj poŝtkartoj. Mi ne troigos dirante, ke tiuj salutoj venis el ĉiuj anguloj de la mondo. Ĉiuj ili estas en E-o.

Preskaŭ sur ĉiu salutletero estas verda kvinpinta stelo. Laŭ tiu signo la e-istoj rekonas sin sur la stratoj de ĉiuj urboj en la tuta mondo. Foje al Varvara Petrovna en la teatro proksimiĝis svedo, kiu konstruis la modernan hotelon „Pribaltijskaja“. Ili bone interparolis en E-o. Jam venis duan fojon japana fraŭlino — ekskursgvidantino Kazi. Tiel longe ili babilis, ke jam malfrue oni devis telefoni por taksio, kiu veturigu ŝin al pensiono „Džuni“. Somero, pluvo, ridi! Kiam Kazi skribas al Leningrado, ŝi ĉiam mencias tiun blankan nokton kaj ĝojas pri la renkontiĝo.

Letero kun verda stelo el Alasko. Sur la koverto brilas poŝtmarkoj kun cervo, papago, noktuoj. El Nederlando — markoj kun virinprofilo. Akrapintaj preĝejoj sur siringokoloraj markoj el Aŭstrio, japana poŝtkarto kun arkosimila branceto de aciderizo surŝtita de ruĝaj floroj. Emilia skribas el Budapeŝto; vizitkarto kun verda stelo venis el Brugge; blanka urso kun ursido estas sur la marko de letero, sendita el Pollando. . . Ĉiu letero ne estas la unua, la korespondado daŭras delonge kaj multaj el tiuj, kiuj sendis salutojn, jam vizitis Leningradon, estas personaj konatoj de Varvara Petrovna.

Kolora foto: sub rozarbusto ĉe dometo, dronanta en floroj, sidas la familio de franco Lezan. Tiuj ĉi rozoj, etaj, dense sursutintaj la arbuston, tiel similas al tiuj, kiuj el halo de la tria etaĝo de Ermitaĝo rigardas al la pinto de la Kolono de Aleksandro, ke ĉiam, haltante antaŭ la pentraĵo de Klod Mone „Gardeno en Monjeron“, mi rememoras tiun ĉi ilustritan poŝtkarton, sur kiu estas surskribo „Kun geamikoj — la rozoj, kaj mi“.

Nur bona homo povas skribi tiel! Mi demandas Varvara Petrovna pri Jan Lezan. Li estas franca komunisto. Partoprenis la Reziston. Instruisto. Nun okupigas pri floroj kaj abeloj. Foje amika e-isto el Moskvo sendis al li publikigitan en soveta revuo rakonton pri amoro: pri tio, kiel la frato de unu el pereintaj en Francio sovetaĵ soldatoj alportis sur ilian tombon plenmanon da tero el Gruzio. La tombejo troviĝas nemalproksime de la urbeto, kie loĝas Jan Lezan. Forkurinte el faŝista koncentrejo niaj soldatoj batalis en taĉmento de la Rezisto kaj pereis. Naŭ nomojn oni povas legi sur bronza tabulo tri foje: en rusa, en grua, en franca. Nomoj kaj partizana kromnomoj kaj tero el Gruzio sub la memorotabulo.

Leginte tiun historion Jan Lezan portis al tiu ĉi loko siajn rozojn. Li vizitis la tombejon ĉiun someron. Pri tio li rakontis al Varvara, kiam ili renkontiĝis en Leningrado.

„Kun geamikoj — la rozoj, kaj mi. . .“

La leterojn oni povas rigardi longe, mirante pri la riĉeco de poligrafiaj eblecoj kaj pri la kvalito de E-o unuigi la homojn; legante skribaĵojn, oni provas diveni, kiu staras malantaŭ ĉiu. . .

En la domo de Varvara Petrovna oni aparte vigne kantas en E-o, kiam revenas ŝia filino Valeria. Tradicio de la e-istoj en la tuta mondo estas la someraj tendaroj. Tie oni kantas multe — tiamaniere, oni pli facile ekmemoras la novajn vortojn.

Se iu venas ĉe el Afrik',  
ni lin komprenas sen helpo de mimik'.

Kaj se vi iras al Amerik'.

tuj iu diras: „Sidigu do, amik'!“


Kaj Varvara Petrovna, kaj multaj aliaj jam plurajn jarojn kolektas ĉirkaŭ si homojn kaj parolas kun ili en E-o. Ili skribas al ĉiuj partoj de la mondo kaj renkontas gastojn — en ĉiu nova jaro pli kaj pli — kun la firma konvinko, ke la internaciaj rilatoj kriegas ne nur de diplomatoj, sed ĉiu el la homoj povas fari la mondon iom pli bela.

La 28an de februaro en luksa salonego de la Stata muzeo pri historio de arto kaj kulturo de Uzbeka SSR (en Samarkando, Uzbekistano) okazis solena inaŭguro de pripaca ekspozicio subdevize „Ni bezonas pacon!“, dediĉita al la glora 110-jara naskiĝtago de V. I. Lenin. Same kiel pasintjare la ekspozicion organizis la Samarkanda E-klubo de Internacia Amikeco kunlabore kun la regiona filio de Uzbeka Amikeca Asocio. Salutelpaŝis la scienca vicedirektoro de la muzeo M. H. Urmanova, la respondeca sekretario de la regiona filio de Uzbeka Amikeca Asocio M. V. Muminova, la estrarano de la Samarkanda Klubo de Internacia Amikeco V. R. Lemelev. Post tio alta funkciulo de la regiona partia komitato U. S. Tursunov tondis la rubandon kaj deklaris la ekspozicion inaŭgurita. La ekspozicio estis ege ampleksa: estis eksponitaj diverslandaj pripacaj afiŝoj, flugfolioj, infandeseĝnaĵoj, libroj, revuoj, gluaĵetoj, insignoj, poŝtmarkoj, gasbalonetoj k. a. pacpropagandiloj. Aparte menciindas la bele ornamitaj folioj kun pli ol 10 000 protestsubskriboj kontraŭ la neŭtrona bombo, kolektitaj de Lenke Dombová — membro de socialisma brigado de frizistoj el urbo Kalocsa (Hungario). Speciala elmontrotabulo temis pri la pripaca agado de MEM kaj pri la kreskanta rolo de la e-istoj en la monda pacbatalo.

La ekspozicion vizitis ankaŭ multnombraj eksterlandaj turistoj. Ĝi estis malfermita por la publiko. Pri la evento raportis gazeto, radio kaj televido, aperis specialaj afiŝoj (en uzbekaj kaj rusa lingvoj) kaj invitiloj. Dum proksima tempo la ekspozicio vizitos Taŝkenton, eventuale ankaŭ aliajn urbojn de USSR.

Anatolo Ionesov

1. La organizantoj de la ekspozicio en Samarkando
2. La publiko



Pri E-o mi diros nur kelkajn vortojn: oni logigas de ĝi; E-on iuj priridis, sed ĝi, elteninte jam preskaŭ cent jarojn, vivas. La deziro kompreni multajn homojn estas altira. La lingvo, kreita de doktoro Zamenhof, evoluas laŭ la leĝoj de la naturaj, historie kreigitaj lingvoj. Naskiĝas novaj vortoj — kaj ili eniras la ĉiutagan praktikon kun aprobo de la Akademio de E-o. En E-o aperas tutmonde centoj da periodaĵoj, ekzistas originala kaj tradukita literaturo. Alvoko en E-o estas rapide aŭdata tra la mondo — tiel okazis, kiam la Vjetnama E-Asocio komencis kolekti helpon por la batalanta popolo.

Ĉiujare okazas kongresoj, funkcias kursoj kaj lernejoj de E-o. Varvara Petrovna ricevas invitojn partopreni ilin, ĉar por la ideo de E-o ŝi varbis multajn homojn.

Si ellernis E-on en la tridekaj jaroj. Mi vidis revuojn de tiu tempo: laboristoj de Sovetunio korespondis kun proletoj el ĉiuj kontinentoj. Poste la eblecoj korespondi kun Germanio malaperis — la faŝistoj minacis ĉiun, kiu ricevas leterojn el USSR. Forfalis la adresatoj el Hungario, el Japanio, el Bulgario... La faŝismo por kelka tempo ĉesigis la disvolvigon de la internacia lingvo.

Leningrado iam estis centro de lernado de E-o far laboristoj. Ĉi tie okazis internacia kongreso de proletaj e-istoj.

Inter la lernantoj de Varvara Petrovna estas kaj aboristoj, kaj konstruistoj, kaj artistoj. En Leningrado

el aktoroj de diversaj teatroj jam formiĝis trupo, kiu preparas spektaklojn en E-o.

Kaj nun mi deziras fini la historion pri tio, kiel du homoj el diversaj landoj, volis koni unu la alian kaj volis celebri 40-jaran jubileon de sia korespondado en E-o.

La ŝuisto Stefan sendis invitolon al sia leningrada amikino.

Varvara Petrovna ekveturis al Vieno. „Sed kiel mi rekonos lin?“ Rekonis ŝin li — renkontis ŝin ĉe la stacidomo, montris al ŝi la urbon kaj eĉ ne por sekundo ellasis ŝin, timante, ke ŝi povas perdiĝi.

La du — kaj la patrino Varvara, kaj la filino Valeria, bibliotekistino, same arda e-istino — vizitis multajn landojn. Kaj kiom da gastoj ili akceptis, renkontis, kondukis tra Leningrado! De Varvara Petrovna konstante oni aŭdas: „Hodiaŭ ĉe ni gastas polino“. Aŭ: „Ni atendas ĉeĥon“, „Ni sendis invitolon al bulgaroj...“

Tiel la homo, realiginta siajn revojn, sukcesis ankaŭ multajn kaj multajn aliajn konvinki, ke nura pravebla malŝparemo sur la tero estas la malŝparemo pri kontaktoj inter la homoj — kaj ĝi estas ebla por ĉiuj.

Galina ZJABLOVA

(J. «Leningradskij Rabotij»,  
n-ro 12/21. III. 1980 — kun mallongigoj)

El la rusa: Kovo

## RENKONTIĜO DE VETERANOJ EN GDR

Fine de marto en Potsdamo apud Berlino, en interhotelo Cecilienhof, okazis renkontiĝo de iamaj membroj de la Germana Laborista E-Asocio (GLEA). Ĝi pasis sub la devizo „Antaŭ la 35a datreveno de la liberiĝo el sub la faŝismo pere de la Ruĝa Armeo“. La temo kaj la loko estis tre trafe elektitaj, ĉar Cecilienhof estas historia memorajo pri la Potsdama Konvencio.

Partoprenis entute 50 gek-doĵ. Por kelkaj tio estis vere emocia kaj agrabla revido post multaj jaroj. Bedaŭrinde ne ĉiuj veteranoj povis ĉeesti — multaj jam ne povas fari tion pro sia malbona sanstato.

K-do Rudolf Hahlbohm, prezidanto de Centra Laborrondo E-o en Kulturigo de GDR, malfermis la kunvenon. Li kore salutis la ĉeestantaron kaj akcentis, ke la renkontiĝo de E-veteranoj jam nun fariĝas firma tradicio. La meritplena k-do Ludwig Schödl (Sodl) donis kelkajn komunikojn kaj gvidis la diskutadon. La ĉefparolado de k-do Detlev Blanke estis tre interesa.

Alfred Müller

## IV ESPERANTISTA KULTUR-FESTIVALO

honore al la 35a datreveno de la libeligo de Ĉeĥoslovakio fare de la Soveta Armeo

12—15 DE SEPTEMBRO 1980, U. OPAVA,

en kadre de la XXIIa kultursemajno „Opava de Bezruč“.

Cefaj aranĝoj:

— Fotokonkurso kun internacia partopreno. La konkursa temo: „La mondo de paco kaj amikeco ĉirkaŭ ni“.

— Deklama kaj kantista konkurso kun internacia partopreno. Fakoj: E-poeziaĵoj, kantoj kaj operarioj. Pluajn informojn vidu en la konkursoj kondiĉoj.

— Arta vespero — Interkona vespero — Solena kunsido.

— Kunvenoj kaj renkontiĝoj de la sekcioj de Ĉeĥa E-Asocio.

— Ekskurso tra la ĉirkaŭaĵo de Opava, vizito de vidindaĵoj.

Loĝiga servo: oni loĝigos interesatojn, kiuj aliĝos antaŭ la 20a de aŭgusto.

Partoprenkotizon eksterlandanoj pagos laŭ specialaj kondiĉoj. Studentoj havas rabaton.

Pluajn informojn petu de: ZK OSTROJ — ESPERANTO-RODETO, NA RYBNICKU 41, 746 01 OPAVA I, CSSR.

La mono estas la mova forto de la milito.

Cicero

La milito estas malbono, kiu malhonorigas la homan genton.

Fenelon

Tutmonda paco regus sur la tero, se ne ekzistus la nocioj „mia“ kaj „via“.

Filding

LA SOMERO VENAS.

AL LA MONTJOJ! AL LA NIGRA MARO!

FELIĈAS LA INFANOJ DE SOCIALISMA BULGARIO.







La partoprenantoj en la Nacia Revuo de la E-Parolo kio, Kanto en Leveĉ. (vd. paĝojn 6-7).

Georgi Karaslavov

## Verdaj steletoj

## BUBALO KAJ SKARABO

Iu kvietu bubalo kuŝis apud akvo kaj remaĉis. Dormetante dolĉe-dolĉe ĝi aŭdis iun voki ĝin de malsupre. La bubalo malfermegis siajn grandajn okulojn kaj ekrigardis. Iu skarabo ŝvingadis per tentakloj kaj akre kverelis:

— Permesu al mi pasi, ni-grulo! Ĉu vi ne vidas, ke mi pasas?

— Sed ĉu gravas, ke vi pasas? — demandis bonanime la bubalo. — Se mi decidus doni vojon al ĉiu besteto, kiu rampas sur la herbo, mi devus neniam dum mia vivo ekkui.

— Ĉu vi ne starigos? — alparolis kolere kaj minace la skarabo.

— Kial mi devas stariĝi? — demandis mirigite la bubalo. — Tie ĉi estas nek vojo, nek ŝoseo, kaj vi veturas nek per veturilo, nek per aŭtomobilo por ne povi



ĉirkaŭpasi.

Tiam la skarabo ekstaris fiere, frapis sin sur la bruston kaj levis minace siajn tentaklojn:

— Sed ĉu vi scias, kiu estas mi? Mi estas la ĉefo

de ĉiuj skaraboj en tiu ĉi regiono!

— Ha-a-a, ĉu tiel! — ek-miris hipokrite la bubalo. — Ehe, se tia estas la kazo, mi starigos, ja ne ekzistas alia solvo... Sed kial vi ne diris al mi tion anticipe, por ke ni ne kverelu tiel longe.

Fakte la bubalo jam intencis stariĝi, ĉar ĝi estis malsatiĝinta.

La skarabo streĉis fiere la lipharojn, aerpleniĝis, ordigis siajn malmolajn nigrajn flugilojn kaj diris al si:

— Vere, teruraĵo mi estas! Jam ne ekzistas sur tiu ĉi tero forto, kiu povus kontraŭstari al mi.

Sed en tiu ĉi momento la bubalo leviĝis, frapetis per sia peza piedo por ekstari kaj dispremis la nigran insekton.

El la bulgara: Dimitro Haĝiev

## FESTO DE LA KNABOJ

En Japanio ekzistas festo de la knabinoj (la 3a de marto) kaj festo de la knaboj (la 5a de majo). Pri la festo de la knabinoj „BE“ informis en sia n-ro 4 dank' al la afableco de s-ano Oono Sioito, kiu sendis al sia bulgara amiko Georgi Litov materialon kaj tiu disponigis ĝin al la redakcio. Ĉi tie ni donas informon pri la festo de la knaboj laŭ materialo sendita same de s-ano Sioito, pro kio ni ege dankas al li.

Por la festo de la knaboj la geavoj patrinaj donas al sia nepo koi-nobori el papero aŭ teksaĵo (flugrubando imitanta karpon) kaj ankaŭ pupojn, kiuj prezentas kuraĝajn kaj saĝajn homojn. Oni ligas koi-nobori al longa

stango starigita ekster la domo kaj ĝi gaje ekilirtas en la aero pro la maja venteto. La pupojn oni ornamas en la ĉambroj samkiel la puparon por la knabinoj.

Ĉion ĉi oni faras ĝis la 13-jara aĝo de la knabo. Ekde tiam li jam estas rigardata junulo kaj ne knabo. Anstataŭ persikfloroj (ĉe la knabinoj), antaŭ la puparo oni nun aranĝas ŝoobu (foliojn de aboro), ĉar la sonoj de tiu vorto (ŝoobu) similas al la sonoj de la vorto signifanta „kuraĝecon“. Oni same preparas manĝaĵojn por kuna tagmanĝo de la tuta familio.

## KONGRESU EN IDEALA TURISTA FERIOLOKO!

Partoprenu la Italian Kongreson de Esperanto en Manfredonia ĉe la Adriatika Maro, Suda Italio, en perfekte ekipita turistejo, de la 6a ĝis la 13a de septembro 1980.

Riĉa kaj varia programo: interkona vespero, teatro, danco, ekskursoj, vizitoj, regalakcepto, debatoj, muziko, folkloro, „literatura tago“ ktp.

Aligo senkotiza por neitaloj.

Petu aligilon de **ITALA ESPERANTO-FEDERACIO**,  
VIA VILLORESI 38, 20143 MILANO, ITALIO.

## BABELA HUMURO

Precipe sportagantoj scias, ke la antaŭa prezidanto de la Internacia Komitato malfarmis ĉiujn olimpikojn en la lingvo de la gastiganta lando. En Meksikio li parolis hispane. Ĵurnalisto, kiu faris reportaĵon pri la solena malfermo, telefonis interalie al sia redakcio:

— Mi ne komprenis la lingvon, en kiu la prezidanto parolis.

Kaj li turnis sin al sia indigena amiko, por ke tiu interpretu.

La meksikano levis okulojn al la ĉielo dirante: — Sinjoro, mi naskiĝis en Meksikio, mia gepatra lingvo estas la hispana, sed ĉe ne unu frazon mi komprenis el lia parolado.

Ginsberg vojaĝis al Ameriko per vaporŝipo. En la restoracio li rezervigis al si lokon ĉe franco. La franco ĉe ĉiu tag-aŭ vespermanĝo renkontis lin per la ĝentilaj vortoj: „Bon apetito“.

Opiniante, ke la franco konatigas kun li, Ginsberg samtiel ĝentile respondadis: „Ginsberg“.

Tiu ĉi ceremonio ripetigis kelkfoje, ĝis iu klarigis al Ginsberg, ke „Bon apetito“ francelingve signifas „Bonan apetiton“.

La saman vesperon Ginsberg rapidis ĝentile turni sin al la franco dirante „Bon apetito“.

Al tio la franco duoble pli ĝentile respondis: „Ginsberg“.

*El bulgara: N. Nikolo\**

## ANEKDOTOJ

*La instruisto:* Diru al mi la nomojn de 7 rabobestoj.  
*Evelin:* 3 leĉoj kaj 4 tigroj.

— Patro, nia instruistino ne estas vidinta ĉevalon.  
— Kial?

— Mi desegnis ĉevalon kaj ŝi venis al mi kaj demandis: „Kio estas tio?“

La instruisto donas klaslaboron: „Kio estas mal-laboremo?“

Li kontrolis vespere la kajorojn kaj prenis la kajoron de Fric.

La unua pago estas sen ia ajn skribo, la dua ankaŭ. Sur la tria pago estas skribite: „Tio estas mallaboremo.“

*El la germana: Simeon Alaeksandrov*

## INTERNACIA ESPERANTO- KURSEJO

1090 — SOFIO, P. K. 791. TEL. 32-40-68

Organizas dum la tuta jaro grupojn, kiuj partoprenas diversajn E-arangojn en Pollando, ĈSSR kaj Hungario. Ĉi-sube ni donas la nomaron de tiuj, kiuj ankoraŭ estas eblaj:

10. Varsovio — **Bidgoŝ** — Gdansk —

Torun — Poznan — Prago — Budapeŝto 3 — 16. VII

11. Kiel punkto 10 10 — 23. VII

12. Varsovio — Torun — Bidgoŝ —

**Funka** — Gdansk — Prago — Budapeŝto 17. VII — 4. VIII

13. Varsovio — **Bidgoŝ** — Gdansk —

Torun — Poznan — Prago — Buda — peŝto 23. VII — 5. VIII

14. Varsovio — **Gdansk** — Malbork —

Prago — Budapeŝto 27. XII — 7. I. 81

15. Prago — **Lanĉov** —

Budapeŝto 27. VI — 14. VII

16. Kiel punkto 15 11. VII — 28. VII

17. Kiel punkto 15 25. VII — 11. VIII

18. Bratislavo — **Koŝice** — Budapeŝto 10. VII — 27. VII

19. Budapeŝto — Eger — Bukureŝto 7. VIII — 25. VII

20. **Budapeŝto** — Bukureŝto 27. XII — 4. I. 81

Ĉiuj grupoj ekveturas de centra fervojstacio Sofia kaj uzas ordinare dormvagonon aŭ kuŝlokon. La kotizo por ĉiu grupo estas 240 levoj escepte grupon 14 kun kotizo de 270 lv. Por ĈSSR la kotizoj estas 220 lv., por Hungario (urbo 1 ger) — 220 lv., por Budapeŝto — 180 lv. En la substrekitaj urboj funkcias E-kursoj.

Sumojn sendu al adreso: 1090 София, ДКС-4, с/ка 185/3025 на Международната есперантска школа.

Aligo al ĉiu grupo — unu monaton pli frue. Skribpeton kaj statistikajn formularojn en du ekzempleroj sendu al la adreso de la kursejo.

## ĈU VI ESTAS OBSERVEMA?

La pentristo volis fari du samspecajn desegnaĵojn. Malgraŭ tio en ambaŭ bildoj estas diferencoj. Provu malkovri ilin. Se vi sukcesis, priskribu ilin en E-o. Vian verketon sendu al „Bulgara Esperantisto“, p. k. 66, Sofio, Bulgario. Inter la trafite solvintoj de la problemoj ni lotumos premion. La nomon de la gajninto ni publikigos. Ek al laboro!

